

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 10
OKT. 1951

人民中國報週

EN TIU ĜI NUMERO:

Salutoj el la Tuta Mondo

Grandaj Sukcesoj de Ĉina Popola
Respubliko en lastaj du Jaroj

Subjugado de Huaj-Rivero—la
Unua Jaro

La Tero

Ĝoja Celebro de la Nacia Tago en Pekino

En la unua de oktobro, pli ol 400,000 homoj partoprenis en la grandioza parado de Nacia Tago ĉe la Placo de Pordego Tien-an en Pekino por celebri la duan datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

La tuta Pekino vekigis de kantado frue en la mateno je tagiĝo, kiam laboristoj kaj kamparanoj, instruistoj kaj lernantoj, medicinaj laborantoj kaj registaraj kadroj iris al siaj asignitaj pozicioj por atendi la komencon de la parado. La vojo de parado estis plēnplena de homoj senpacience atendantaj por vidi la grandan paradon. Laŭlonge de la tuta ĉefa bulvarado estis kolonoj de elegante vestitaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, starantaj en atento. Komitatoj de dommastrinoj kaj sindikatoj starigis surstratajn refreŝigejojn, provizante al la paradantoj senpage. Virinoj zorgante pri tiaj refreŝigejoj sentis ke ĉar multaj el la partoprenantoj venis el diversaj partoj de la lando, tio ja estas la plej malmulton kiun ili povas fari por gastigi.

La Placo de Pordego Tien-an estis eksterordinare majesta kaj impona, dekorita de festaj ruĝaj flagoj kaj sloganoj. Je 9.50 atm., Prezidento Maŭ Ze-tung kaj aliaj Registaraj gvidantoj suriris la estradan meze de la sonoj de "Oriente Ruĝas Sun" ludata de instrumenta milita muzikistaro de 700 homoj kaj la tondra aplaŭdo de la ĉeestantoj.

Ĉirkaŭ 80 gastoj de popolaj organizoj el diversaj landoj kiuj estas ĉi tie por la Nacia Tago estis sur alta teraso antaŭ Pordego Tien-an. Ili inkluzivis Ilja Ehrenburg kaj Pablo Neruda, plenumajn membrojn de la Monda Paca Komitato, la Sovetian, Bulgarian, Rumanian, Hungarian, Koreian, Ĉeĥoslovakian, Polian, Mongolian, Germanian, Vietnaman, Hindian, Birman kaj Indonezian Delegaciojn kaj la Pakistanan delegiton.

Ĉeestis sur alta teraso ankaŭ pli ol 100 gastoj de diversaj diplomaciaj personaroj inkluzive de la Sovetia, Ĉeĥoslovakia, Koreia, Rumania, Hindia, Mongolia, Bulgaria, Svedia kaj Birma ambasadoroj, Ĉefo de la Diplomatia Misio de la Germana Demokrata Respubliko, Ĉefo de la Diplomatia Misio de Vietnamo, la Dana, kaj Svisa ministroj, kaj Indonezia, Pakistana, Polia kaj Hungaria Respondeculoj de Aferoj dumtempaj.

Kromaj terasoj estis konstruitaj precipe por la centoj da delegitoj el ĉiuj partoj de la mondo kaj el ĉiuj anguloj de Ĉinio. La kolorriĉan paradon rigardis kun fiero kaj ĝojo la plej bonaj gefiloj de Ĉinio, batalherooj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, herooj de infanteria, tanka, aera kaj mara fortoj de la Popola Liberiga Armeo, eminentaj inĝenieroj kaj laboristoj de la subjugado de Huaj-rivero, laborherooj en industrio kaj agrikulturo, veteranaj batalantoj de la antaŭaj gerilaj bazoj kaj transmaraj ĉinoj el diversaj landoj.

Je 10 atm. Lin Po-ĉju, Ĉefa Sekretario de la Centra Popola Registaro, anoncis la malfermon de la ceremonio. Dudek ok salvoj ŝiris la aeron, dum la muzikistaro ludis la nacian himnon.

Ĉefkomandanto Ĉu Teh revuis la trupojn en jipaŭto. Li salutis ĉiun unuon laŭvice kaj la armeanoj respondis per krioj de "Vivu Ĉefkomandanto Ĉu Teh." Reveninte al la estrado, Ĉu Teh legis la Ordonon de la Tago:

Ĉiuj kamaradoj komandantoj, batalantoj, politikaj laborantoj kaj laborantoj de postfronta servo de la tera, aera, mara kaj publiksekura fortoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj ĉiuj kamaradoj milicianoj:

Jam pasis du jaroj de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Nia granda patrio gajnis brilajn venkojn kaj atingojn dum ĉi tiuj du jaroj. Ni komplete liberigis la ĉeŝteron de nia lando. La bonaj gefiloj de la ĉina popolo sinorganizis en la Ĉinajn Popolajn Volontulojn, kiuj batalas ŝultron ĉe ŝultron kun la Korea Popola Armeo, gardas la sekuron de nia patrio, donas batojn al la Usonaj imperiistaj invadantoj kaj gajnis grandajn venkojn.

Ni efektivigis grandskalan agran reformon, subpremon de kontraŭrevolucio kaj ekstermajn kampanojn kontraŭ banditoj. Tio plue fortigis

la popoldemokratian diktatorecon kaj gardis nacian konstruon. Ni stabiligis varprezojn, revivigis industrion kaj komercon, kaj nia agrikultura produkto atingis la nivelon antaŭ la Kontraŭ-japana Milito. Nia eduka laboro ankaŭ havis rimarkindajn disvolvon kaj progreson. Ĉi tiuj estas la rezultoj de intima unueco kaj komuna peno de la armeo kaj la civiluloj. Ĉi tie mi prezentas al vi miajn elkorajn gratulojn, dankojn kaj salutojn.

Sed ni devas vidi, ke Usona imperiismo, kiu havas ekstremam malamom kontraŭ la venkoj de la ĉina popolo kaj ne volontas akcepti sian malvenkon, ne nur ankoraŭ okupas nian Tajvan-on ĉiamaniere malhelpas kaj sabotas la koreajn armisticeajn intertraktadojn kaj daŭrigas sian invadan militon kontraŭ Koreio, sed ankaŭ aktive preparas novan militon. Arogante ignorante la kontraŭstaron de la tuta mondo, ĝi devigis siajn satelitajn landojn subskribi apartan pactraktadon kun Japanio. Ĝi senkaŝe rearmas Japanion kaj Okcidentan Germanion. La danĝero de milito grave minacas la sekuron de nia patrio kaj pacon en la Oriento kaj la mondo. Tial, mi ordonas vin stari firme sur viaj batalpostenoj kun vigilanco, plue fortigi la konstruon de naciaj defendoj kaj firmigi la naciajn defendojn de nia patrio, studi nekontentigite kaj serioze por mastri novajn teknikojn kaj lerni kunordigitan operacion de ĉiuj armiloj, altigi la nivelon de moderna milita scienco kaj arto por gvidi trupojn, plue altigi la planecon, organizecon kaj

precizecon de ĉiuj specoj de laboro, firmigi kaj altigi militan disciplinon kaj batali por konstrui modernigitajn fortojn de nacia defendo! Batalu por la liberigo de Tajvan, Penghu (澎湖) Kinmen (金門) kaj aliaj insuloj kaj por efektiviĝi la grandan aferon unuigi tutan Ĉinion! Batalu por defendi la sekuron kaj sanktajn teritoriojn, teritoriajn marojn kaj teritorian aeron de la patrio! Batalu por defendi pacon en la Oriento kaj la mondo!

Vivu la granda unueco de la ĉina popolo!

Vivu la granda unueco de la Aziaj popoloj!

Vivu la granda unueco de la popoloj de la mondo!

Vivu la Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la Ĉina Popola Liberiga Armeo!

Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung, la granda gvidanto de la ĉina popolo!


Gvidate de Vic-ĉefo de Stabo Nieh Jung-ĉen, la milita parado komencis per formacio de la studentoj el la milita akademio, multaj el kiuj estas harditaj kaj meritplenaj komandantoj nun plue trejnataj pri moderna milito. Ilin sekvis junaj kadetoj el ĉiuj branĉoj de la armeo—infanterio, kirasitaj aŭtoj, militŝiparo, artilerio kaj aera forto. La daŭraj ovacioj donitaj al ili de la civiluloj montris la fieron de la popolo ke iliaj plej bonaj gefiloj nun lernas mastri ĉiujn flankojn de moderna milito por gardi siajn nacian sekuron kaj pacon konstruon.

Sekvis ilin reprezentantoj de milicoj el diversaj partoj de la lando, ĉiuj el ili batalherooj kaj labormodeloj.

Post ili venis kavaleriaj trupoj, kontraŭaeroplanaj unuoj, diversaj specoj de artilerio, motorigita infanterio kaj pezaj kaj malpezaj tankoj. La impresa aerparado kaŭzis specialajn ovaciojn, kiam diversaj specoj de aeroplanoj flugis superkape en formacio. Ĉio ĉi montras novan disvolvon en la potenco de la ĉina popolo.

Centoj da miloj da civilaj paradantoj venis post la milita parado. Ili marŝis tra la placo kaj ilia entuziasmo atingis la zeniton kiam kriante sloganojn ili pasis preter la estrado kie Prezidanto Maŭ Ze-tung staris mansvingante por saluti. "Vivu Maŭ Ze-tung" aŭdigis tra la tuta tago kaj literigis de formacioj de geknaboj, gejunuloj kaj geviroj en variece de lertaj desegnaĵoj kaj modeloj. Aliaj sloganoj kriataj de la paradantoj kaj

(daŭrigo sur p. 78)



De dekstre maldekstren Li Ki-ŝen, Sung King-ling, Ĉu Teh, Prezidanto Maŭ Ze-tung, Liu Saŭ-ĉi, Ĉou En-laj k.a. sur la Pordego Tien-An

SALUTOJ EL LA TUTA MONDO

— El 137 salutleteroj el 23 landoj al la Centra Popola Registaro de Ĉinio —

El Bulgario

Karaj kamaradoj,

Ni estas feliĉaj sendante al vi la korajn salutojn de la tutlandaj bulgaraj geesperantistoj, organizitaj en bulgaraj landorganizo—Bulgara Esperantista Asocio kaj Bulgara Esperantista Kooperativo.

Ni sincere deklaras al vi, ke la dujara datreveno de la fondiĝo de via glora Popola Respubliko estas ankaŭ nia ĝoja festo.

Dum la nigraj tagoj de Ĉjang Kaj-ŝek-regado kaj imperiista invado ni estis en seninterrompa kontakto per Esperanto kun la ĉinaj popoloj batalantoj. Kun granda simpatio ni observis la luktojn de la ĉina popolo, dolore sentis ĝiajn suferojn kaj ĝojis pri ĝiaj venkoj, ĉar tiuj venkoj estis ankaŭ niaj venkoj kaj samtempe venkoj de la tutmondaj popoloj kontraŭ la internacia bando de la imperiistaj kaj faŝistaj kanibaloj.

Post multaj suferoj kaj heroaj bataloj la ĉina popolo liberigis porterne kaj nun feliĉe konstruas la novan landon, ĝuante la sperton kaj la helpon de la plej granda amiko de la tutmondaj popoloj, la unua popola kaj socialisma ŝtato U.S.S.R.

Nun USSR, Ĉina Popola Respubliko kaj la ceteraj popoldemokrataj landoj estas la fiero kaj la espero de la tutmondaj popolamasoj, kiuj sopiras por libereco, paco kaj socialismo, nur per kiuj la tuta homaro povos vivi en prospero kaj feliĉo.

Vivu la tutmondaj batalantaj popoloj por tutmonda libereco, paco kaj socialismo!

Vivu la Korea Popola Armeo kaj ĝiaj bravaj helpantoj la Ĉinaj Volontuloj! Vivu USSR kaj la popoldemokrataj landoj por espero kaj apogo de la tutmondaj popoloj!

(daŭrigo de p. 77)

Ĝoja Celebro

elmontrataj sur standardoj gratis la unuecon de la popoloj de Azio kaj tra la mondo.

La paradantoj portis grandajn portretojn de Maŭ Ze-tung, Sun Jat-sen, Liu Ŝaŭ-ĉi, Coŭ En-laj kaj Ĉu Teh, kaj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, kaj gvidantoj de diverslandaj popoloj.

Taĉmento post taĉmento, precipe tiuj de la geknaboj kaj studentoj, konkuris unu kun la alia en la koloro kaj ingenienco de ilia elmontro. Kolomboj de paco estis eminentaj inter multaj el ili, dum ĉiuj aspektoj de industria, agrikultura kaj kultura vivo estis ilustritaj en modeloj, grafikoj, skulpturoj kaj pentraĵoj. Grandaj grupoj de talitamburaj, jango-aj kaj aliaj dancantoj ensoreis la rigardantojn per sia kolorriĉa gracieco, kiam ili dancis tra la placo.

Grupoj el la naciaj minoritatoj en siaj okulfrapaj kostumoj aldonis pluan kolorecon al la parado, kiam ili preterpasis post la fervojaj laboristoj, konstruistoj, inĝenieroj, instruistoj kaj aliaj. Kiam la granda art-kaj-literatura armeo preterpasis la estradon, ili levis ruĝajn kaj flavajn tukojn, kiuj konsistigis la vortojn "Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung, kaj "Vivu Stalin." La giganta figuro de Ĉina Volontulo, kun bajoneto direktita antaŭen esprimis la vignecon kaj pretecon de la tuta ĉina popolo, kiuj montris sian senliman energion, unuecon kaj entuziasmon en ĉi tiu parado, por fari ĉion necesan por defendi siajn malfacile gajnitajn sendependecon kaj prosperon kontraŭ iu ajn imperiisma invado kaj por gajni pacon en Azio kaj la tuta mondo.

Vespere en la Placo de Pordego Tien-an denove kolektigis grandaj amasoj de homoj de ĉiuj aĝoj kaj profesioj por danci kaj kanti. Krom la dancantoj, miloj da aliaj festantoj plenplenigis ĉiujn haveblajn spacojn en kaj ekster la placo por rigardi la ĝojegan festadon. La celebraz atingis la apogon, kiam multkoloraj fajrajaj ŝprucis ĉielen kaj multaj kolonoj da lumo el potencaj baterioj de serĉlumoj en diversaj punktoj de la urbo transiris la stellumigitan ĉielon. Dancado kaj kantado daŭris tra la tuta nokto.

Vivu la Ĉina Popola Respubliko kaj ĝia admirinda popolo!

Vivu kamarado Stalin!

Vivu kamarado Maŭ Ze-tung!

Bulgara Esperantista Kooperativo
Prezidanto M. Conkovsk
Sekretario Ev. Cifudov

El Germana Demokrata Respubliko

Karaj ĉinaj gekamaradoj!

Preterpasis nun du jaroj, depost vi fondis vian popol-registaron, gvid-

ciataj de Usonaj imperiistoj. Sed viaj kuraĝaj soldatoj, kamparanoj kaj laboristoj liberigis la tutan landon, kaj forpelis ĉiujn malamikojn. Sed la USA generaloj interligis sin kun la pupa registaro de Li Sing-man. Ili intencis de tiu ĉi flanko invadi vian landon. Sed viaj kuraĝaj Volontuloj tuj iris por helpi Nordkoreion, kaj gardi komune vian patrion.

En San Francisko oni ekvidis la veran vizaĝon de Truman-registaro. Vi, gekamaradoj en Ĉinio, kiuj plej



Reprezentantoj el la dekoj da ĉinaj minoritatoj partoprenas la paradon

atan de via Prezidanto Maŭ Ze-tung, la fidela filo de la ĉina popolo. Tiu ĉi tago rememorigas vin pri la tempo, plena de batalo kontraŭ malamikoj en kaj ekster-landaj, pri la bataloj kontraŭ japanaj agresantoj, kontraŭ la Ĉjang-Kaj-ŝek-perfiduloj subven-

longe batalis kontraŭ Japanio ne estis invitataj por prepari packontrakton kun Japanio.

Montriĝas, ke ĝi ne estas pacpakto, sed pakto por prepari novan militon.

Sed la hodiaŭa tago estas por vi tago por rigardi antaŭen. Dum la pasintaj du jaroj vi atingis bonajn sukcesojn. Via bela, leginda Esp-gazeto "El Popola Ĉinio" ja bone informas nin. En ĉiuj partoj de via granda lando, por ĉiuj homoj, ĉu laboristoj en urboj, aŭ vilaĝanoj sur la novricevita tero pliboniĝis la vivkondiĉoj. Ĉiu nova gazet-numero de via bulteno respegulas sukcesojn, atingitajn en via vivo-batalo. Ĉiu artikolo montras al ni la amon por via ŝatata prezidanto, kaj gvidanto de via komunista partio k-do Maŭ Ze-tung.

Sed ankaŭ ni esperantistoj, kelk-mil kilometrojn malproksime de via lando, bone scias, ke via Maŭ estas kara amiko por nia lingvo.

Li bone scias, ke Esperanto estas vera interkomprenilo por la mond-proletaro dum nia liberec-batalo kaj en la konstruo de socialismo.

Hodiaŭ dum via festtago niaj pensoj estas en via lando, ĉiuj viaj sukcesoj ĝojigas nin.

Tiamaniere vi fortigas la pacon. Hodiaŭ dum via festtago per la pensoj mi premas viajn manojn. Ni esperas, ke pli sukcese estu la venonta jaro; ke saneco kaj feliĉo ĉirkaŭu vian ŝatatan prezidanton kaj ĉiujn ministrojn de via Popola Registaro.

Antaŭen al la konstruado de la socialismo kaj la mondpaco. Ruĝ-fratajn salutojn sendas kelkaj pro-

letaj esperantistoj en Greiz, Thur, kaj la junulara grupo Greiz-Irchwitz de la libera germana junularo.

Terbert Trummer

El Japanio

Karaj gekamaradoj kaj gefratoj en la Ĉina Popola Respubliko!

Okaze de la dujara datreveno de l' fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ni sendas nian elkoran ĝojsaluton!!

Antaŭ du jaroj, en 1949, via Ĉina Popola Respubliko fondiĝis, kaj ĝia fondiĝo havas grandan signifon en mondhistorio. De tiam via Ĉina Popola Respubliko, enlande progresadis firme kaj rapide, kaj eksterlande ĉiam kuraĝigis popolojn de Azio, kiuj batalas kontraŭ imperiistoj.

Hodiaŭ, la 1-a tago de oktobro, estas festotago ne nur por vi ĉina popolo, sed samtempe por ankaŭ ni Aziaj popoloj.

Antaŭ ĉirkaŭ 1 monato en San Francisko en Usono, "la Repaciĝa Konferenco" estis malfermata. Ĉe tiu Repaciĝa Konferenco, Usono altrudis sian malneton, kaj rifuzis ĉeeston de reprezentantaro de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko. Kaj japana reacia registaro de Joŝida subskribis al tiu "Repaciĝa Traktato". Sed, ni kredas, antaŭ ĉio unue Japanio devas pardonpeti kaj repaciĝi kun popola Ĉinio, ĉar japanaj imperiistoj atakis kaj afliktadis la popolon de Ĉinio plej violente kaj longe eĉ dum 8 jaroj. Spite de tiu ĉi evidenta fakto, reacia registaro de Joŝida ne repaciĝas kun Ĉina Popola Respubliko, kaj dume subpremas kruele la voĉojn de japana popolo, kiuj laŭte postulas ĉiufankan repaciĝon kaj kontraŭas rearmitigon de Japanio. Ekzemple, dum aŭgusto kaj septembro, registaro subpremis multegajn packunvenojn en ĉiu loko per armitaj poliestaroj. Vidinte ĉi tiajn faktojn, ĉu oni povas diri ke "Japanio jam estas tute demokratigita?" Ĉu ĉi tiu estas la vojo al paco? Ne! Ne! Ni ne povas opinii tiel! Reakciuloj volas kaj preparas rearmi Japanion. Ili, reaciaj imperiistoj, deziras uzi japanan junularon por nova imperiisma milito. Por tio ili volas neniigi Pacan Konstitucion de Japanio! Nun estas grava tempo por ni japana popolo kaj ankaŭ por popoloj en tuta Azio!!

Sed, japana popolo, kiu spertis la unuan en la mondo ĉiujn mizerojn kaj eĉ teruron de atombombo, scias, ke ni devas batali kaj venki faŝismon por defendi nian liberecon kaj feliĉon. Kaj en ĉi tiu nia porpaca fronto popoloj de Azio firme kunligiĝas! Nia fronto estas internacia, kaj en tiu fronto vi ĉina popolo kaj ni japana popolo estas fratoj kaj kolegoj! Ni vigne antaŭeniru kune brakon en brako, por la pli bela paca mondo!

Do, ni finas nian salutleteron per ĉi-subaj elkoraj krioj:

Ni japanaj pacamantoj niam ĉesigos batalon kontraŭ faŝismo!

Ni japanaj junuloj niam militos kontraŭ fratoj de Azio!

Vivu, kresku, kaj floru Ĉina Popola Respubliko—la fortikajo de l' paco!!

Elkore esperante vian prosperon kaj gloran venkon de pacdefendanto en tuta mondo!

Sincere viaj
EGKU kaj KSLE

Grandaj Sukcesoj de Ĉina Popola Respubliko

en Lastaj du Jaroj

Fondiĝis jam du jarojn la nova popola Ĉinio—Ĉina Popola Respubliko. Tiuj ĉi du jaroj estas jaroj de grandegaj venkoj kaj fulmorapida progreso de la ĉina popolo. Enlande nia liberiga batalo venke disvolvigis. Krom Tajvan (台灣) kaj kelkaj sudmaraj insuloj ni liberigis la tutan landon kaj fortikigis la popolan regpotencon. Eksterlande ni sukcesis starigi diplomatan rilaton kun Sovet-Unio kaj ceteraj 18 landoj kaj kontraktis kun Sovet-Unio Kontrakton de Amikeco, Alianco, kaj Interhelpo. Nia patrolando nun estas jam lando potenca, kaj sendependa en la mondo. Sangiĝas ambaŭ la internaj klasorilatoj kaj rilatoj kun fremdlandoj. Kaj bazite sur tiaj novaj rilatoj kaj gvidate de la Centra Popola Registaro kaj la Ĉina Komunista Partio, la ĉina popolo entreprenis diversajn reformojn kaj konstruadon pri politika, ekonomia kaj kulturaj aferoj, kaj rikoltas grandajn venkojn kaj sukcesojn.

Ekonomia Konstruado

La plej signifplenaj estas la sukcesoj aktivataj en la kadro de ekonomia konstruado. El ili ni povas citi la jenajn:

1) *Ĉesigo de inflacio kaj stabilo de varprezoj:* Ekde marto de 1950 t.e. ses monatojn post la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, la inflacio kaj prezofluktuado estas fakte ĉesigita. Tio estas miraklo en la lastaj 12 jaroj, dum kiuj la tutlanda popolo suferis de tiuj du monstroj, kiujn postlasis la 22-jara fi-regado de Kuomintangaj banditoj. Tio estas ebla, ĉar la Centra Popola Registaro dediĉas grandan forton jam de februaro en 1950 unuigo de la nacia financo kaj bilanco de la nacia budĝeto. Ekde tiam tiuj du monstroj estas venkitaj. En decembro, 1950 la indico de prezoj de 25 ĉefaj varoj en ses grandaj urboj montris, ke la prezoj ne nur ne altiĝis, sed eĉ malaltiĝis meznombro je 5% kompare kun tiu en februaro. En la unua duonjaro de 1951 la prezoj de 32 ĉefaj varoj en ses grandaj urboj altiĝis nur 10%. Oni devas rimarki, ke tia stabila situacio estas akirita en la cirkonstanco, kiam la milito ankoraŭ ne entute finiĝis kaj la ekonomia konstruo ankoraŭ ne tute disvolviĝas. Tio ja estas unika en la mondo kaj senprecedenca en la historio.

2) *Agrikultura produkto altigita:* Kvankam Ĉinio estas lando agrikultura, tamen ĝia agrikultura produktivo estis tre malalta pro la ekspluatado de la imperiistoj kaj feŭdaj bienuloj kaj la damaĝo de la senĉesaj militoj. Post la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio tiuj duobla ekspluatado fundamente foriĝis kaj ankaŭ la paco estis akirita enlande. Tio ebligas al la restarigo de la agrikultura produkto kaj marŝo al pli alta progreso.

En 1950 agrikultura produkto altiĝis je 14% pli ol tiu de 1949, kaj atingis 85.7% de la plej alta jara produkto antaŭ la milito. En la malnovaj liberigitaj regionoj ĝi jam atingis tiujn antaŭ la milito. Kotona produkto en 1950 altiĝis je 60 kompare kun tiu en 1949 kaj atingis

83.7% de la jara produkto antaŭ la milito. Tio garantias la bezonon de krudaj materialoj de la teksaj industrioj. La produktivo de grenoj kaj kontonoj en 1951 jam donas esperon al pli granda altiĝo.

Grava por la altiĝo de agrikultura produktivo kaj sekuro de la milionoj da popolanoj estas la efektiviĝo de grandaj akvokonservaj planoj, precipe la giganta laboro de subjugado de Huaj-Rivero iniciatita de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj komencita en novembro de 1950. Nun la unua periodo de la laboro jam sukcese finiĝis en julio de la kuranta jaro. La tutan laboron partoprenis 3,000,000 kamparanaj laboristoj. Krom la gigantaj teknikaj

de fervojoj. Ĝis la fino de 1950 jam funkciigas pli ol 22,600 kilometroj t.e. 91% de la tuta longo de la fervojo de Ĉinio. Krome estas konstruata la fervojoj Ĉengtu-Ĉungking (成渝鐵路), Tienŝuj-Lanĉou (天蘭鐵路) kaj Laipin-Ĉennankuan (來賓鎮南關鐵路).

La komunikado de landvojoj ankaŭ multe disvolviĝis post la liberiĝo. Ĉia tuta longo nun atingis pli ol 100,000 kilometrojn, t.e. kvinoble pli longa ol tiu tuj post la liberiĝo kaj du trioniojn ol tiu en 1936.

La poŝtaj linioj longiĝas ĝis 900,000 kilometroj t.e. 60% pli ol tiu en 1937. Telegrafaj linioj pli longiĝis je 36% super tiun en 1937. Longdistantaj telefonaj linioj 125% plilongiĝas ol



"Nur la Popola Registaro povis fari nin posedantoj de ĉi tiu bona greno," diris maljuna kamparano Ĉau de Honan-Provinco.

laboroj ĉirkaŭ 195,000,000 kubmetroj de terlaboroj estas faritaj en la konstruado kaj riparo de akvokonservejoj, digoj, kaj en la dragado de riveroj kaj kanaloj. Ekde nun 55,000,000 popolanoj apud la Huaj-Rivero liberiĝos de la minacoj de inundo.

3) *Industrio kaj minado:* Rapidega estis la restarigo de industrio kaj minaj entreprenoj en la pasintaj du jaroj. En 1950 la produktivo de kontonaj fadenoj kaj teksaĵoj estas 99.5% de la plej alta jara produkto antaŭ la kontraŭjapana milito kaj superas tiun de 1936 je 16%. Laŭ plano, ĉijara produkto superos tiun de la lasta jaro je 33% kaj la plej altan produkton antaŭ la Kontraŭjapana milito je 28%. De januaro ĝis aŭgusto de la kuranta jaro la tuta produkto de kruda fero 11.4-obliĝas kompare kun tiu en la sama periodo de 1949. Kaj tiu de ŝtalo 7.8-obliĝis. Produktivo de la ŝtataj minejoj altiĝis je 23% ol tiu de 1949 kaj la produkta plano estas superigita je 5.97% en la unuaj tri monatoj de tiu ĉi jaro. La provizo de elektra energio en 1950 ankaŭ superas tiun en 1949 je 14.46%.

4) *Komunikado:* Surpriza estas la restarigo kaj disvolvo de la reto

antaŭ la kontraŭjapana milito. Krome la civila avia entrepreno fondiĝis dank' al helpo de Sovet-Unio.

5) *La disvolviĝo de enlanda kaj ekstera komerco:* Fava eksporta bilanco je 9.34% estas akirita en 1950 unufoje de post 1877. Tio estas granda ŝanĝo en la historio de ĉina eksporta komerco. Tiun ĉi ŝanĝon kaŭzis ĉefe tio ke la ĉina doganejo nun plene liberiĝis el sub la manoj de la imperiistoj kaj la ĉina popolo jam povas mem mastri tiun ŝlosilon por la bono de la nacia industrio.

Enlande ankaŭ bone prosperas la komercoj inter la urboj kaj la vastaj vilaĝoj t.e. inter la industriaj centroj kaj agrikulturaj produktivejoj. Laŭ nekompleta statistiko la ŝtata komerca kompanio en 1950 negocis je lokaj produktaj valorantaj egale al 190,000,000 kilogramoj da rizo. Dank' al tio la aĉetpovo de la kamparanoj rimarkeble altiĝas kaj la industriaj produktaj trovas vastan merkaton enlandan.

6) *Kooperativoj:* Ĝis junio de 1951, post unuigo de malgrandaj en grandajn, estis 42,427 kooperativoj tra la tuta lando kun 51,000,000 membroj. La membraro de 1951 estas pli ol dek obloj de tiu en 1949.

La kooperativoj multe helpas al la komerco inter la urboj kaj vilaĝoj kaj garantias la provizon de la bezonataj ĉiutagaĵoj de la civitanoj.

Edukado kaj Kulturaj Laboroj

Dank' al la venko de la ĉina popola revolucio kaj la radikala ŝanĝo de la politika kaj ekonomia kondiĉoj rapide progresas ankaŭ la kulturaj kaj edukaj laboroj.

Laŭ nekompleta statistiko ĝis aprilo de la kuranta jaro estas 30,000,000 lernantoj en la elementaj lernejoj, pli ol 1,500,000 en mezlernejoj kaj 130,000 en universitatoj kaj altaj lernejoj.

Speciale rimarkebla estas la atingo en Nord-Orienta Ĉinio, kie la nombro de studentoj en altaj lernejoj altiĝas je 29% kompare kun tiu dum la japana okupado, en mezlernejoj—172.5%, kaj elementaj lernejoj—80.1%.

Alia karakterizo por la eduko de la popola Ĉinio estas la rapida kresko de la nombro de la gefiloj de la laboristoj kaj kamparanoj en la lernantoj. Ekzemple en la Nord-Oriento 67.6% el la lernantoj en la mezlernejoj estas laborista-kamparane devenaj, kaj en Hopej-Provinco—79.9%.

Tute kontraŭe ol antaŭe, ĉiuj diplomitoj el la lernejoj nun trovas sian laboron en diversaj kampoj de la vasta tutnacia konstruado.

Libertempaj lernejoj por laboristoj kaj kamparanoj ankaŭ rapide kreskas. Ĝis aprilo ĉijare jam pli ol 1,200,000 laboristoj lernas en libertempaj lernejoj dum en 1950 en la sama tempo nur 700,000. En lasta vintro la nombro de kamparanaj lernantoj atingis 25,000,000 dum en la vintro de 1949 nur 10,000,000. Laŭ statistiko en lasta jaro jam 3,480,000 kamparanoj lernas en regulaj lernejoj kaj 135,000 laborista-kamparane devenaj kadroj ricevis necesan edukadon.

Eldonado en nova Ĉinio spertas senprecedencan kreskon en la lastaj du jaroj. En 1950 pli ol 271,782,509 ekzempleroj de libroj, gazetoj, bruaŝuroj eldoniĝis en Ĉinio. Da verkoj de Marks, Engles, Lenin kaj Stalin eldoniĝis 2,275,964 ekzempleroj kaj tiuj de Prezidanto Maŭ Ze-tung 983,486.

Estas 382 tagjurnaloj en la tuta lando kaj 73 popolaj radiostacioj. Ili intime interligiĝas kun la legantoj kaj aŭskultantoj.

Sanitara laboro nun vere enpenetriĝas en la vastaj popolamasoj. En 1950 pli ol 81,300,000 ĉivitanoj ricevis kontraŭepidemiajn injektojn de serumoj de tifo, holero kaj ceteraj. Krome estis vakcinitaj 109,000,000 homoj per kontraŭviriola serumo.

Ĉisupraj priskriboj estas ĝeneralaj bildoj de la okulfrapaj sukcesoj ricevitaj akiritaj en la lastaj du jaroj. Tio estas ebla nur sub la ĝusta gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Centra Popola Registaro kaj la komuna klepodo de tuta ĉina popolo.

Nia nuna tasko estas daŭrigi la konstruon kaj defendon de nia patrio kaj frakasi ĉiujn invadajn intrigojn de la imperiistoj, ke ni firmpaŝe antaŭen marŝu sub la gvido de Prezidanto Maŭ-Ze-tung kaj la Centra Popola Registaro.

Vizito al la Hejmvilaĝo de Prezidanto Maŭ Ze-tung

— Vang Ĉi (王啓) —

La prapatra hejmo de Maŭ Ze-tung troviĝas ĉe Ŝaŭŝanĉung-vilaĝo (韶山冲) ĉirkaŭ sep dek mejlojn sude de Ĉangŝa (长沙), ĉefurbo de Hunan-Provinco (湖南省). Por la vojaĝo de Ĉangŝa al Ŝaŭŝanĉung mi bezonis tuttagan veturado per vaporŝipo, aŭtobuso kaj rajdo sur ĉevalo.

Unu someran vesperon, mi atingis la vilaĝon Ŝaŭŝanĉung. Ĉe la oficejo de la vilaĝa Kamparana Asocio, mi

rakontis al mi multe pri Maŭ Ze-tung. La sekvanta estas unu el tiuj rakontoj, kiujn maljunaj komparanoj plej ŝatas rakonti.

En 1931, post la fiasko de la Kuomintangaj generaloj en iliaj unuaj du militiroj kontraŭ la Ruĝa Armeo sub la gvido de Maŭ Ze-tung, venis en ilian kapon nova ideo. Ili metis sian esperon sur la superŝticia kredo, ke detruu la tombojn de la mortintoj

Semo Semita de Maŭ Ze-tung

Atinginte la vilaĝan kooperativon, kiu okupas nun novan kaj belan duetagan domon mi vizitis 73-jaran Maŭ Jue-ĉou (毛月秋). Li estas alte respektate de la popolanoj, ne nur pro tio, ke li estas bona kooperativa administranto, sed ankaŭ pro tio, ke li estas veterana revoluciulo.

Li diris al mi, ke la Komunista Partia Filio en Ŝaŭŝanĉung, estis, fakte starigita de Maŭ Ze-tung mem. Ĝi lukstis subtere por pli ol dudek jaroj sub la plej severaj kondiĉoj. Post la eksplodo de la Unua Revolucia Civilmilito en 1925, Maŭ Ze-tung revenis al sia hejmvilaĝo. Per simplaj klaraj diroj lin karakterizantaj, li parolis al la vilaĝanoj, elmontrante al ili la vojon de revolucio. Liaj instruoj alportis grandan influon sur la kampanoj kaj post nelonge estis ekstarigita Komunista Partia Filio, kiu inkluzivis la plej progresivajn kampanojn de la vilaĝo. Maŭ Jue-ĉou estis inter la unuaj, kiuj aliĝis al la Partio.

Dum la longaj jaroj post la perfido de Ĉiang Kaj-ŝek al la revolucio en 1927, la Ŝaŭŝanĉunga Partia Filio, kiu estis devigata iri subteren, ludis gravan rolon en ĉiu lukto de la Ŝaŭŝanĉungaj popolanoj kontraŭ Kuomintanga faŝismo: kontraŭ altega imposto, revizicio, konskripto k.t.p. Dume, pli kaj pli multe da kampanoj politike vekigintaj petis por partianiĝi, tiel ke la filio havis pli ol cent membrojn je la antaŭvespero de la liberigo, anstataŭ nur kelkaj kiel en la komencaj tagoj.

Kiam la Popola Liberiga Armeo marŝis suden trans la Jangze-Rivero dum la frua somero de 1949, la Ŝaŭŝanĉunga Partia filio gvidis sian gerilan trupon de pli ol cent homoj al aktiva batalo. Kune kun aliaj gerilaj trupoj, ĉi tiu armita taĉmento

ĉung jam alportis novan vivon al ĉiu en la vilaĝo. Su Ŝaŭ-tang (蘇少堂), antaŭe dungita terkulturisto, diris al mi, kiom multe lia vivo pliboniĝis. Li diris, "Nia Printempa Festo ĉijare estis vera festo. Por la unua fojo en mia vivo mi havis sufiĉe da rizo por manĝi. Mi ne plu estis ĉasata de kreditoroj. Por memoriĝi la okazon, mi aĉetis dek unu funtojn da porkaĵo kaj krome botelon da vino. Ĉiu el miaj familianoj havas por si novajn vestojn. Mi neniam havus tian feliĉon, se ne troviĝus ĉe ni Prezidanto Maŭ."

Pli kaj pli multe da kampanoj nun povas sendi siajn gefilojn al lernejoj. La lernantoj nombriĝis 469 ĉijare, t.e. trioble pli multe ol antaŭ la liberigo. Tri kvaronoj de tiuj lernantoj venas el antaŭaj malriĉaj kampanoj kaj dungitaj terkulturistoj. Ekzistas ankaŭ kvin vesperaj lernejoj, kies devo estas ĉefe nuligi analfabetojn inter la plenkreskuloj.

Kvankam tre okupataj en konstruado de plibona vivo, la Ŝaŭŝanĉungaj popolanoj ne forgesas esti singardemaj al imperiistaj militinstigantoj. La lastatempa kampano por donaco de aeroplanoj kaj tankoj por fortikigi la nacian defendon de la patrio trovas entuziasman respondon inter la Ŝaŭŝanĉungaj popolanoj. Ĉiu en Ŝaŭŝanĉung penas en produktado por akiri pli multe da mono por kontribui al aĉeto de batalaeroplanoj estas tiel plenaj je entuziasmo kaj energio. Kiam mi surĉevaliĝis kaj adiaŭis al la amikecaj vilaĝanoj, ili varme petis min iam reveni, kaj promesis, ke je mia duafoja vizito, mi vidos Ĉaŭŝanĉung-on eĉ pli prospera.

Tradukis Censinio


(daŭrigo de p. 85)

La sanga krimo de la brutuloj fine estis malkaŝitaj de la popolanoj de Vuĉang kaj Hankou (汉口). Estinta monaĥino de la vartejo, Liu Cvej-jeng (劉翠英), la unua, en la tagjurnalo publikigis la fakton. La Vuĉang-Hankoŝa Filio de la Help-Societo, kaj la Demokrata Virina Federacio, en aprilo iris en la vartejon por esplori, serĉi la lokon, kie la infanoj estis enterigitaj, kaj por ilin elfosi. La senditaj laborantoj estis malhelpataj kaj kontraŭataj de Usonaj imperiistoj. La lastaj utiligis la ĉiuvesperan preĝadon por trompi kaj timigi la orfinojn kaj monaĥinojn kiuj estas jam vekigintaj. Samtempe ili per kurhundoj disvastigis kalumnion. Sed nun antaŭ la amaso da ostoj la murdistoj neniel povas ruze senkulpigi sin.

La 26an de majo, en Vuĉang, 84,000 popolanoj faris denuncan amaskunvenon; eksplodis la indigno de la popolamaso. Dume denuncis Fang Ta-ku (方大姑) kies kvar infanoj mortis en la diabla kaverno, la orfinoj nove revivigintaj kaj la patrinoj kiuj perdis siajn infanojn. 84,000 homoj ĵuris unuvoĉe: "la registaro arestu la murdistojn kaj ilin severe punu!" La reprezentanto de la registaro deklaris akcepti la postulon de la amaso kaj tuj arestis la krimulojn Kuo Ŝe-ĉi kaj Ŝju Lajte certiginte pri iliaj krimoj. La amaso arde hurais kaj aplaudiis por esprimi sian koran dankemon.

Nun la suĉinfanoj kaj geknaboj de la vartejo jam revenis en la sinon de la patrio kaj tiu loko kie estis la buĉejo de la Usonaj imperiistoj, nun en la mano de la popolo jam fariĝos paradizo por infanoj.

Tradukis Nash



Jen la domo en kiu Prezidanto Maŭ naskiĝis

estis varme akceptata de la estro, alportus malfeliĉon kaj mizeron al forta junulo ĉirkaŭ tridek-jara. Eksciinte ke mi deziras tuj vidi la malnovan loĝejon de Prezidanto Maŭ, li sugestis ke ni ekiru tuj al la domo.

Post dudek-minuta irado laŭlonge de vojeto, kiu iras apude de malprofunda rivereto, ni ekvidis tegoltegmentan domon, situantan ĉe la piedo de monteto kun malkrutaj deklivoj, kovritaj de verdaj bambuaroj kaj pinoj. Ĉi tie estas la loko, kie naskiĝis Maŭ Ze-tung. Antaŭ la domo, maturaj, bongustaj kukurboj kaj kukurbetoj pendas sur bonorda bambuframo, kaj kelkajn metrojn for de la domo estis du lagetoj, en kiuj, oni diras, Maŭ Ze-tung kutimis naĝi kiam li estis knabo.

La ĉambro en kiu Maŭ Ze-tung loĝis estas tre malluma kaj malgranda. Tie li ofte legis ĝis profunda nokto, sub apenaŭ briletanta flamo de olelampo. Li ŝirmis la fenestron por ke lia patro ne vidu la lumon kaj malhelpu lian studon.

Oni kondukis min al rizkampoj proksime de la domo. Mi sciigis, ke estis sur tiu ĉi terpeco Maŭ Ze-tung komencis sian terkulturan laboron kiam li estis nur ses-jara. "Prezidanto Maŭ estis bona terkulturisto," oni diras. "Kiam li revenis el lernejo en Ĉangŝa dum sia somera ferio, li ankoraŭ konservis la kutimojn de diligenta kampano kaj laboris sur la kampoj. Ĉiu ŝatis labori kun li kaj aŭskultis al liaj diroj."


Kiam ni restis tie, dekoj da kampanoj el la najbaraj domoj proksimiĝis al ni. Ili aŭdis, ke alvenis vizitanto el Pekino, kaj ili deziris scii pri la plej lastatempa novaĵo pri Maŭ Ze-tung. Tiel arde ili deziris aŭdi pri sia amata samvilaĝano kaj gvidanto ke ili kvazaŭ avido glutis ĉiun vorton de mi eldiritan.

Malnovaj Rakontoj Ripetitaj

Dum mia tri-taga restado en la vilaĝo, la loĝantoj de Ŝaŭŝanĉung delonge havas por Maŭ Ze-tung.

la vivantaj posteuloj.

Sekve ili sendis grandan nombron da spionoj al Ŝaŭŝanĉung por trovi la tombon de la avo de Maŭ Ze-tung. Ĉiu en la vilaĝo ŝajnis, ke li ne scias kie la tombo troviĝas. Kaj krome en iu pluva nokto la vilaĝanoj ŝtele kovris la tombon per freŝa koto, tiel ke sur ĝi formiĝis dekliveto. Post nelonge, trupo da soldatoj estis sendita al Ŝaŭŝanĉung el la Kuomintanga armea ĉefstabo. En iu malluma nokto, la soldatoj fosis tri tombojn



Kampanoj de Ŝaŭŝanĉung irigacias siajn rizkampojn per akvorado

kaj forportis la ĉerkojn, kredante, ke ili jam trovis tiun kiun ili tiel longe serĉis. Ege plaĉis al la Ŝaŭŝanĉungaj popolanoj kiam ili ektrovis en la sekvanta mateno, ke la tombo de la avo de Maŭ Ze-tung restas netuŝita, dum du el tiuj detruitaj tomboj apartenas al terposedantaj familioj.

Ĉi tiu rakonto, nun multe ŝatata en la vilaĝo, bone reflektas la senkorecon de la Kuomintangaj regintoj, kaj samtempe la profundan amon, kiun la popolanoj de Ŝaŭŝanĉung

ludis brilan parton en la distranĉigo de la retirigintaj Kuomintangaj trupoj en la montara regiono najbare de Ĉangŝa. En tiu batalado, ĉirkaŭ 2,000 Kuomintangaj soldatoj estis kaptitaj.

Post la liberigo, la Ŝaŭŝanĉunga Partia filio ankaŭ estas la gvidanto en la efektiva de sociaj reformoj, kiuj helpas ŝanĝi la vivon en la vilaĝo.

Dankon al Prezidanto Maŭ

Agrara reformo kompletigita en frua printempo, ĉijare, en Ŝaŭŝan-

Subjugado de Huaj-Rivero — la Unua Jaro

Plenumiĝo de la unuajara tasko en radikala subjugado de Huaj-Rivero estas miraklo en la historio de la konstruado de akvokonservado kaj irigacio de Ĉinio.

Dum ĉirkaŭ ok monatoj, de la vintro de 1950 ĝis julio de 1951, konstruiĝis la kluzo ĉe Junhoki (滹河集分水閘) kiu kapablas reteni 7,200,000,000 kubmetrojn da inundakvo en la ĉefa linio de Huaj-Rivero, kaj akvokonservejo en Ŝemantan (石漫灘水庫) kiu kapablas reteni sufiĉe da akvo por irigaci 6,000 hektarojn da tero, kompletigis digoj, drago,

kanalo k.t.p. de 195,000,000 kubmetroj da terlaboraĵo entute. Se per tiom da tero oni konstruus muron unu metron altan kaj unu metron dikan, la muro longus je 200,000 kilometroj, kiu povus ĉirkaŭi la terglobon kvinfojojn ĉe la ekvatoro.

Laŭ la decido de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro en oktobro, 1950, la ĉefaj rimedoj por subjugado de Huaj-Rivero estas "konservo kaj forkonduko." La ĉefa celo de la subjugado de Huaj-Rivero sub la direkto de la Popola Registaro estas utiligi la akvon. Por

meti fundamenton por la estonta grandskala ekonomia konstruado oni devas ne nur malebligi por ĉiam la inundon, sed ankaŭ disvolvi akvo-utiligadon. La reakcia Kuomintanga regantaro alte kantis dum dudek jaroj pri subjugado de Huaj-Rivero, sed neniam pripensis konstruon de akvo-konservejo por disvolvi la sistemon de irigacio. Sub la antaŭa feŭda regado la kontraŭaj interesoj neakordigeblaj ekzistis en la supra, meza kaj malsupra valoj, sekve estis tute neeble projekti planon por subjugado de Huaj-Rivero ĉe ĝiaj supra, meza kaj malsupra partoj samtempe. Sed nun sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Centra Popola Registaro, laborantoj ĉe la supra, meza kaj malsupra valoj serioze kunlaboris, kaj la nesolveblaj problemoj en la historio estis facile solvitaj. La Kuomintanga regimo nur elspezis por tiu ĉi granda laboro 350,000,000 kilogramojn da greno, kaj granda parto de tio iris en la personajn poŝojn de la koruptaj reakciaj oficistoj. Sed nun, la unuajara elspezo de la Popola Registaro por la laboro de subjugado de Huaj-Rivero jam multe ĝin superis. Tri milionoj da civil-laborantoj ĉe la valo de Huaj-Rivero en Honan Provinco, norda Hupej-Provinco, norda Kingsu-Provinco estis mobilizitaj dum la lasta vintro kaj tiu ĉi printempo, krom pli ol 16,000 specialistoj de akvo-konservado, inĝenieroj kaj diversaj teknikistoj. Tio ankaŭ estas senprecedenca en la historio. Por

certigi la ĝustatempan liveradon de la necesaj materialoj, la Komitato de la Subjugado de Huaj-Rivero sendis kelk-mil kadrojn organizi sur la komunikaj linioj grandan komunikan reton, kaj establis kelkajn centojn da transportaj stacioj. La fervojaj administristoj de ĉiu loko ankaŭ certigis la fruan transporton de tiaj materialoj. Preskaŭ ĉiuj ŝipoj sur Huaj-Rivero organiziĝis por servi al la subjugado de tiu ĉi rivero. Nur en la regiono de Norda Anhuej-Provinco oni mobilizis pli ol 8,000 ŝipojn por transporti tiajn materialojn, pli ol 7,400 grandajn kaj malgrandajn veturilojn kun 60,000 ŝipanoj kaj pli ol 900,000 kamparanoj partoprenantaj en la transportado. Per tiu ĉi granda komunika reto oni povis transporti pli ol 1,000,000,000 kilogramojn da materialoj el Nordoriento, suda marbordo, Ŝantung-duoninsulo kaj Centra Ĉinio.

Tiu ĉi granda laboro estas ĉiam subtenata de la popolo en ĉiu loko de la tuta lando. Kion oni bezonas, tion oni tuj alsendas. Ekzemple, por konstrui la Junhoki-kluzon kaj la Akvokonservejon en Ŝemantan, miloj da spertuloj venis el Ŝanhajo, Hangĉou (杭州), Nankino (南京), Vusi (無錫), Cengĉou (鄭州), Kaj-feng (開封) kaj aliaj urboj. Dum la konstruado de Junhoki-kluzo, mankis ŝtonhakistoj. La komitato de la subjugado de Huaj-Rivero petis helpon de la Popola Registaro de Ŝantung-Provinco. En dek tagoj 1,600 ŝtonhakistoj rapidiĝis al Junhoki. La konstruo de la kluzo

(daŭrigo sur p. 84)



"Jen subjugita estas la Huaj-Rivero!" diris la maljunulino al siaj genepoj montrante al la Junhoki-Kluzo

Nova Labormetodo de Ho Kien-ŝiu

La nomo de Ho Kien-ŝiu (郝建秀), 17-jara ŝpinistino kiu kreis novan sciencan labormetodon en ŝpinado, fariĝis hodiaŭ unu el la plej fierindaj nomoj de novĉinaj laboristoj. La ĉefaj ĵurnaloj de la tuta Ĉinio donas grandan spacon por raportoj pri la kreado kaj valoro de ŝia sciencia labormetodo kaj specialaj konferencoj kaj kunsidoj estis kunvokitaj por disvastigi ŝian novan labormetodon. Sinjoro Ĉen Ŝaŭ-min (陳少敏), prezidanto de la Tutlanda Komitato de la Sindikato de Ŝpinistoj kaj Tekstistoj, diris: "En sia praktikado, la ŝpinistoj de Cingtaŭ (青島) jam pruvis, ke per la labormetodo de Ho Kien-ŝiu oni povas krei grandan kvanton da riĉaĵo por la ŝtato."

En oktobro de 1949, Ho Kien-ŝiu eniris la Sesan Ŝtatan Ŝpincejon en Cingtaŭ, Ŝantung - Provinco (山東省). Sukcesinte en la enira ekzameno ŝi fariĝis lernanto de ŝpinado, kaj progresis tre rapide en sia lernado kaj post tri monatoj ŝi jam kapablis prizorgi 300 spindelojn.

En la unua tago post la Novjaro laŭ la lunkalendaro, kiam ŝi fariĝis elerminta ŝpinistino, ŝi komencis deĵoradi nokte. Same kiel aliaj gejunuloj, ankaŭ Ho Kien-ŝiu tre ŝatis ludi en la tago. Pro manko de sufiĉa ripozo, ŝi ne povis venki dormetadon super laboro, kiam ŝi deĵoris nokte. Multon ŝi fuŝfaris kaj tio rikoltis hajlon da kritikoj de la gekamaradoj.

Sed Ho Kien-ŝiu ne perdis sian entuziasmon pro la kritikoj; ŝi gravuris tiun lecionon en sian koron kaj cerbumadis por trovi rimedon maloftigi la rompiĝon de fadeno kaj malpliigi rulilkotonon. Por malebl-

igi dormetadon super laboro, ŝi senĉese rondiradis ĉirkaŭ la ŝpinmaŝino por kontrolo. En praktiko ŝi trovis ke iuj punktoj de la malnova labormetodo estas neraciaj, ekzemple laŭ la malnova labormetodo oni devas purigi la plankon kaj maŝinon en fiksita tempo. Ŝi provadis kaj fine trovis novan labormetodon.

Dum la ĉirkaŭirado, ŝi purigadas la maŝinpartojn per la dekstra mano kaj tenante balailon en la maldekstra mano ŝi purigas samtempe ankaŭ la plankon. Se ŝi trovas ke iu fadeno rompiĝis, ŝi ĝin interligas apoginte la balailon kontraŭ sia gambo. Ŝi neniam reen iras dum la kontrolo ĉirkaŭiro por interligi rompiĝintan fadenon aŭ fari alion, sed ĉiam iras antaŭen kaj la rompiĝintan fadenon ŝi interligas nur ĉe la sekvanta ĉirkaŭiro. Se ŝi trovas, ke iu spindelo tre ofte rompas la fadenon, ŝi ĝin markas per kredo, por ke ŝi ĝin reordigu poste.

En sia praktiko, Ho Kien-ŝiu trovis, ke plibona purigado povas maloftigi rompiĝon de fadenoj kaj ŝia racia kombino de laboroj povas ŝpari al ŝi tempon kaj energion. Ŝi daŭre praktikadis sian racian kaj regulan laboron kaj dediĉis pli da tempo al la purigado. Dank' al la nova labormetodo, fine ŝi sukcesis redukti la proporcion de rulilkotono ĝis 0.25% meznombro en ĉiu monato.

En tri ĉefaj punktoj povas resumigi la labormetodo de Ho Kien-ŝiu: a). mastri la maŝinon, sed ne esti sklavo

de la maŝino; b). racie kombini diversajn laborojn, ilin fari samtempe kaj tiamaniere ŝpari tempon kaj energion; c). bone zorgi pri purigado kaj maloftigi rompiĝon de fadeno kaj malpliigi rulilkotonon. Pri la kreo de la sciencia labormetodo de Ho Kien-ŝiu oni devas rimarkigi, ke ĝi estas kristaliĝo de laborspertoj, sed ne apriora kreaĵo.



La plej rimarkindaj punktoj de la valoro de la labormetodo de Ho Kien-ŝiu estas la jenaj:

1) Ĝi povas pligrandigi la produktokvanton, ŝpari krudmaterialojn, malaltigi la kostojn de produktado

kaj plilongigi la servopovan aĝon de maŝino.

2) Dank' al tiu labormetodo parto de socia laborforto povas esti ŝparita pro la pli granda nombro de spindeloj prizorgataj de ĉiu laboristo.

3) La labormetodo de Ho Kien-ŝiu estas aplikebla ankaŭ en la laboroj antaŭŝpinaj, en teksado kaj konservado.

4) La metodo helpas en starigo de la sistemo de "fiksita kvoto de produkto", kio siavice provizas kondiĉon por ebligi laŭplanan ekonomian kalkulon.

Kiam Ho Kien-ŝiu estis honorita pro la kreo de nova rekordoj en malpliigo de rulilkotono, ŝi estis primokata de siaj gekolegoj. Ili ne kredis, ke ŝiaj sukcesoj estas atingitaj dank' al la nova labormetodo. La maljunaj laboristoj opiniis, ke la sukcesoj de Ho Kien-ŝiu estas atingitaj ĉefe dank' al ŝiaj akraj okuloj kaj rapidmovaj membroj, kiajn ili neniam povos rehavi. Iuj eĉ suspektis, ke ŝi nur forkaŝis la rulilkotonon. Ili ne volis akcepti ŝian novan labormetodon. Nur dank' al la ĝusta gvidado de Kompartia Komitato en Cingtaŭ, la administristoj de la fabriko, la sindikato de ŝpinistoj kaj tekstistoj kaj la Novdemokratia Junula Ligo, kiuj tiel bone atentis pri kreaĵo de popolamaso, fine la sciencia labormetodo de Ho Kien-ŝiu disvastiĝis en Cingtaŭ. Kaj nun ĝi estas disvastigata en diversaj ŝpincejoj kaj teksejoj tra la tuta Ĉinio.

—Laŭlum



En malnova Ĉinio Juifuŝiang (瑞蚨祥) estis la plej granda ŝtofirmo en Pekino, kiu vendis precipe multekostajn silkon, atlason kaj pelton al riĉaj burokratoj kaj bienuloj.

Post la liberigo de Pekino tiaj klientoj forkuris aŭ kaŝiĝis kaj ŝajnis sin malriĉaj, kaj tiel fariĝis tre malfacile vendi tiajn multe kostajn varojn. Tutaĵn tagojn la administranto Kiaŭ (焦) sidadis en la administratorejo gemante kaj nenion farante. Kiam la ŝtofkomercista Gildo aŭ la Burao por Industrio kaj Komercio invitis lin al kunsido, li neiam partoprenis. Je plej bona kazo li nur sendis sian sekretarian ĉeesti anstataŭe. Li eĉ ne emis al ĵurnalo-legado. Renkontante administranton de iu alia firma li ĉiam plendis kun brovoj kuntiritaj: "Ni jam nenion povas fari." "Penlaborente tutan vivon, nun ni devas rekoni, ke vaniĝas nia tuta strebado! Nun ni kalkulas nian vivon per tagoj!"

Li ankaŭ ne multe zorgis pri la negocoj en la firma. Kiam li eliris el la firma, li preterpasis la montrotablojn kun kapo klinita. Vidante la komizojn, li ĉiam sentis malagrablon opiniante ke la komizoj organizis sindikaton nur por kontraŭstari la kapitalistaron, kaj aŭdante ke la komizoj kunvenas, li ĉiam kun batanta koro klopedis diversmaniere informiĝi pri la temoj de la kunveno.

Kaj la komizoj? Ili parolis kun la administranto nur kelkajn vortojn dum tuta jaro. Vidante la administranton eĉ la malnovaj komizoj kuragiis nur humile sin klini titolante "Mastro Kiaŭ la Kvina!" sed nenion alian plu diri.

Tamen, en novdemokratia Ĉinio, la politiko ja ne estas kontraŭ ĉia kapitalismo, sed nur burokratia kapitalismo. Por prepari ekonomie postlasigantan Ĉinion por socialismo, male, ni ankorau devas disvolvi nacian kapitalismon sub la gvido de la ŝtata socialisma ekonomio. Tial tia komerca firma kiel Juifuŝiang private posedata de nacia kapitalisto ja ankorau povas ludi sian rolon nur se ĝi sin turnos al la servo de la popolanoj anstataŭ al la malaperintaj burokratoj kaj bienuloj. Tiam ekonomian politikon de novdemokratia Ĉinio la administranto kaj la komizoj de Juifuŝiang ambaŭ ne bone komprenis tuj post la liberigo de Pekino.

En la komenco de la pasinta jaro, la respondeculo de la Sindikatfilio de Juifuŝiang partoprenis la lernadon en la komizo-kurso, kiun aranĝis la Unio de Laboristaj Sindikatoj de Pekino. Aŭdinte en ĝi la raporton de k-do Ĉang Ĉun-kiu (張春久), estro de la Komiza Sindikato, pri la politiko: "bono al ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj, 1) li ekkomprenis pri la akordiĝo de intereso nuntempa kaj longdaŭra. Kiam li reveninte transdiris tion al siaj kolegoj, la komizoj iom post iom ŝanĝis sian labormanieron. Ili memvole malaltigis siajn salajrojn por instigi la kapitaliston al aktiveco por disvolvi la negocojn, kaj konsilis al la kapitalisto ŝanĝi sian entre-

prenan direkton: forvendi per favora prezo la silkon, atlason kaj pelton, kiuj servis antaŭe nur por la "alt-ranguloj kaj nobeloj," kaj enaĉeti ŝtofon por vendi al kamparanoj. Ĉe la komenco la kapitalistoj ankorau ne sufiĉe aktivigis, sed ili pensis: "Ĉiel ajn nur malprofito, ni do provu!" Neatendite tio ekrevivigis la firmon Juifuŝiang! Unu monaton poste, la salajroj de la komizoj estis realigitaj ĝis la malnova nivelo.

Pasintjare kiam komencigis la movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion, ankaŭ en ilia penso estiĝis haoso. Iuj pensis: "Kiamniere kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion ni komercantoj povus?"

En marto ĉi-jare, la Sindikatfilio de Juifuŝiang komunikis la raportojn de la Unio de la Laboristaj Sindikatoj de Pekino pri la movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion kaj ilin diskutigis en grupoj. Krome ĝi organizis 4 grupojn de ĵurnalo-legado, en kiuj oni legas ĵurnalojn je ĉiu dua tago. Nur post tio klariĝis la pensoj de la komizoj. Samtempe la komizoj rememoris pri siaj kolegoj Vang Ĉiaŭ-ĝu (王教鑄), Ĉang Kin-ĉung (張金鐘), Kiaŭ Fang-lin (焦方麟), k.a., kiuj dum

fakto nian amon al nia patrio, kaj se ni farus eraron, ni ankaŭ havus mezurilon por ĝin mezuri."

Tiel daŭris du tagojn la preparado por la pakto. La komizoj diris: "Sen nia Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Komunista Partio, ĉu ni povus vivi tiel bone hodiaŭ?" Pro tio ili unue skribis en la pakton "Por Prezidanto Maŭ." "Por la Komunista Partio." "Por la Popola Registaro." Ĉiuj esprimis ke ili ĉiam obeos Prezidanton Maŭ kaj sekvos la Komunistan Partion. Krom "Ĉiam propagandi al la popolamaso, diligente studi ĉiutagajn novaĵojn kaj bone funkcii en la grupojn de ĵurnalo-legado," post diskutado, ili ankaŭ enskribis kiel ĉefan enhavon "Unuiĝi kun la kapitalistaro. Ne eviti, sed frue pagi la imposton," kaj "Helpi la registaron malkovri reakciajn agentojn." Por bone memori la pakton kiun ili mem kontraktis, ili voĉlegas ĝin en ĉiu kunveno.

Post tio la komizoj pli entuziasmiĝis. Ili pendigis en la korto grandajn karikaturojn pri la Usonaj invadistoj, presigis sur la volvopaperoj propagandentraĵojn "Ne aĉetu Usonan varon!" Ili ankaŭ faris multajn aŭtomatajn propagandajojn ekz. "galopanta kavaleriano de ĉinaj po-

la mezo de aprilo, kiam li vidis ke la komizoj kontraktis patriotan pakton, li mem ankaŭ faris kontrakton: "Mi ne ŝuldas la imposton nek kontrabandos, kaj pli frue ĝin pagos; mi diligente studos ĉiutagajn novaĵojn; kaj mi helpos la registaron malkovri reakciajn agentojn." Dume li diris al la komizoj: "Ne plu titolu min Sinjoro Mastro! Sufiĉas nur 'administranto' aŭ 'sinjoro'."

En la stimulo de la patriota pakto, la 25-an de aprilo la firma jam plenumis la planon enspezi en aprilo 1.5 miliardojn da juanoj de pomalgranda vendado, kaj ankorau superis ĝin per 96 milionoj. Ĝis la 30-a de aprilo la tuta enspezo atingis 1.87 miliardojn, kaj la enspezo en majo rekordis per 2 miliardoj kaj 2 milionoj.

Pro la konsilo de la komizoj la 3-an de majo la administranto Kiaŭ iris al la impostejo kaj pagis la imposton por aprilo. La 1-an de junio li ankaŭ ĝustatempe pagis la imposton por majo.

La klopodoj de la komizoj, kiuj havigis al la firma profiton, tre tuŝis la administranton Kiaŭ ke li memvole proponis plialtigi la vivnivelon de la komizoj. Li diris: "Se vi havas raciajn postulojn prezentu kaj mi certe akceptos." Li dufoje disdonis al la komizoj 8.7 milionojn da juanoj kiel premion por ilia laboro, kaj krome plibonigis la manĝon de la komizoj kaj starigis por la komizoj klubon komplete ekipitan. Kaj post tiuj elspezoj la kapitalistaro ankorau ricevis netan profiton de pli ol 30 milionoj.

La 2-an de junio, kiam la komizoj legis sur ĵurnalo la alvokon de la Ĉina Popola Asocio por Kontraŭbatali Usonon kaj Helpi Koreion pri ofero de aeroplanoj kaj kanonoj, en la vespero ili tuj okazigis kunvenon de la komizaro. Ĉiuj konkure oferis parton el siaj premioj. Entute ili oferis 3.5 milionojn da juanoj. La reprezentanto de la kapitalistoj esprimis ke ili ankaŭ oferas parton el sia profito por aĉeti aeroplanon kaj kanonon.

Trad. J. Plinov

TRANSFORMIĜO

EN JUJFUŝIANG ŜTOFFIRMO

Fu Tung (傅冬)

la antijapana milito estis senkaŭze arestitaj de la japanaj diabloj, turene vundbatitaj per brikaj je la piedoj kaj mortigitaj post akvo-enverŝo) kaj aliaj torturoj; pri siaj 12 kolegoj: Ju Zung-ĵou (于宗幼), Kiaŭ Ju-teh (焦玉德), k.a., kiuj estis de la japanaj diabloj turene vipitaj kaj enkarcerigitaj; pri la Usonaj diabloj kiuj, post la venko de la antijapana milito, venis malordigi la varojn en ilia firma, ofendis ĉinajn virinojn surstrate kvazaŭ kapti kokidojn; kaj pri la korea popolo vivanta en granda mizero. Ĉiuj ili ekindignis kun kolera okuloj. Li Ĉing-ĉang (李慶昌) el la unua grupo de ĵurnalolegado diris: "Ja ne utilas nura kriado: Kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion! Ni devas agi konkrete." Tuj oni tion aprobis dirante: "Prave! Ni multe vendu pomalgrande per favora prezo kaj grandigu la impostpagon. Tio ja signifas kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion!" Iuj aldonis: "Ni bone propagandu al la klientoj. Pli da personoj kiuj komprenas la signifon de la movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion, signifas pli da obusoj por ekstermi la Usonajn diablojn." Post diskuto tra la vespero ili decidis klopedi enspezi en aprilo 1.5 miliardojn da juanoj (ĉina monunu) per pomalgranda vendado.

La 11-an de majo la Pekinaj privataj entreprenoj aranĝis kunvenon de reprezentantoj, en kiu respondeculo de la Unio de Laboristaj Sindikatoj de Pekino alvokis ke la firmoj kontraktu patriotan pakton) laŭ siaj respektivaj kondiĉoj. Kiam la prezidanto de la Sindikatfilio de Juifuŝiang reveninte komunikis la alvokon, la komizoj tuj ekkriis: "Tre bone! Tio ĝuste identas kun nia volo. Tiel ni povos firmigi per la

polaj volontuloj" ktp. Timante ke ili ne povos buŝe propagandi al la klientoj pro okupateco en negoco, ili presigis flugfoliojn kaj disdonis al la klientoj por ke ili povu ilin legi hejme. Plie ili ĝuis multajn afiŝojn en restoracioj, trajoj, vagonaroj kaj aŭtobusoj. Konsentite de la kapitalistaro ok komizoj eĉ disiris propagandi en vilaĝoj malproksimaj je dekoj da lioj for de la urbo dum tri tagoj, kaj samtempe ili ankaŭ sciigis pri la bezonoj de la kamparanoj por poste pligustigi la entreprenan direkton.

Komencigis ankaŭ la laborkontrola kunsido en ĉiu dua tago. Dum la laborado la komizoj sin interhelpas. Se okazas misfaro ili reciproke kritikas kaj memkritikas. Vespere kiam ili revenis al la loĝejo, ne plu okupas ilin babilado aŭ legado de "Domo de Allogatinoj", "Sep Herooj kaj Kvin Bravuloj", sed ĵurnalo-legado aŭ diskutoj pri problemoj. Eĉ Haŭ Bo-ĉuan (郝伯泉), la de kelkdek jaroj legemulo de "Tri Herooj", tenas nun en siaj manoj "La Komuna Programo de la Politika Konsiliga Konferenco de Ĉina Popolo."

Vidante ke la komizoj bone laboras kaj havigis al la firma profiton, ankaŭ pli entuziasmiĝis la administranto Kiaŭ. En novembro de la pasinta jaro li partoprenis la manifestacion de Pekinaj komercistoj kaj industriistoj, kaj kontraktis la patriotan pakton de ŝtofirmoj. Kaj ĉi-jare en marto li partoprenis la politikan kurson kaj prelegokurson de ĉiutagaj novaĵoj, kiujn aranĝis la Demokrata Landkonstrua Asocio kaj la Ŝtof-komercista Gildo, kaj prenis sur sin la propagandan laboron pri la movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion inter komercistoj kaj industriistoj en la 6-a distrikto. En

1) Ĉi tie 'kapitalistaro' signifas naciajn kapitalistojn, kiuj estas unu el la kvar amikoj (laboristoj, kamparanoj, etburĝoj kaj naciaj kapitalistoj) en la unueca fronto de popoldemokratia diktatoreco kontraŭ la tri malamikoj (imperiestoj, burokratiaj kapitalistoj kaj bienuloj).

2) Akvo-enverŝo: speco de tortura metodo. Per enverŝo de akvo tra la naztruoj aŭ tra la buŝo en la stomakon ĝis kiam la stomako plene plenas ŝveliĝas. Kaj poste oni elpremas la akvon per piedopremo sur la ventro. Tiam torturan metodon la japanaj diabloj kaj kuomintangaj banditoj ofte uzis kontraŭ revoluciuloj kaj senkulpuloj.

3) En patriota pakto oni kunigas la movadon kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion kun la produkta kampanjo, kaj konkretigas sian patriotismon en ĉiutagajn laborojn.



4) Malnovaj noveloj.

Lulilo de Popola Kino de Nova Ĉinio

Vizito al la Kina Lernejo

Ŝu Mu (舒木)

En la nordokcidenta urbango de Pekino sidas granda bonorda kaj pura domaro. Ĝi estas la hodiaŭa Kina Lernejo—la lulilo de popola kino de nova Ĉinio.

En unu serena posttagmezo mi vizitis tiun plej altan instituton de kulturado de kinaj artistokadroj. Kiam mi alvenis, unuj el la studentoj estis farantaj elparolan aŭ gimnastikan ekzercon en la malantaŭa korto, kaj aliaj atenteme legantaj en la biblioteko. La lernejo pleniĝis de vigla kaj gaja atmosfero.

La disvolvo de la popola kino de nova Ĉinio estas grava ĉenero de la kultura konstruado de novdemokratia. Por certigi brilan sukceson al tiu granda laboro, kulture novajn kadrojn kaj altniveligis la laborantaj kadrojn estas nuntempe jam grava tasko. Pro tio, la Kina Buroo de la Centra Ministerio por Kulturo decidis fondi Kinan Lernejon.

La embrio de la Kina Lernejo estis la Art-laborejo de la Centra Kina Buroo. La lernejo fondiĝis en la dua duono de la jaro 1950. En aŭgusto, 1950 ĝi unufoje varbis studentojn en Pekino, Ŝanhajo, Nankino kaj Ĉangĉun (長春), kaj malfermiĝis en oktobro. Ĉar ĝi celas eleduki novajn popolajn aktorojn de nova Ĉinio, ĝi starigis tre severan elektonormon. Tiam en la suprediritaj kvar urboj registriĝis pli ol mil personoj por la ekzameno, sed la elektitoj nombris nur kvardek.

En lasta aŭgusto la Kina Lernejo varbis en Pekino, Ŝanhajo kaj Tienzin studentojn. El ĉirkaŭ 2,000 ekzamenitoj oni elektis 40 por la aktora kurso kaj 30 por la dramaturgia kurso. Kaj estas rimarkinde ke ĉirkaŭ kvarono el la elektitoj estas laboristoj.

La Kina Lernejo provizore enhavas du fakultatojn: arta fakultato kaj teknika fakultato. En la unua estas kursoj dramaturgia, direktora, aktora, muzika, belarta, sinalliga, k.a.; en la lasta estas kursoj fotografaj, sonrekorda, rivelaj, filmordiga, filmbeliga, special-teknika, k.a. Krome estas planate starigi administran fakultaton, k.a. Estas decidite la gigantan laborplanon plenumi en du jaroj, t.e. en du jaroj ĉiuj fakultatoj kaj kursoj malfermiĝos. Nuntempe pro la manko de domoj la lernejo malfermis nur la du kursojn aktoran kaj dramaturgian.

La celo de la Kina Lernejo estas eduki, laŭ la "arta kaj literatura direkto por laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj" indikita de Prezidanto Maŭ, kinartajn kadrojn kun proleta ideologio, kiuj kapablas prezenti la vivon en nova Ĉinio per realisma prezentmetodo revolucia.

La lernotempo por la aktora kurso provizore estas du jaroj. Post la finiĝo de la lernado la studentoj estos senditaj kiel "provaj aktoroj" al ŝtataj filmstudioj, kaj post certa tempo, tiuj, kiuj havos bonajn atingojn, promociiĝos al kvalifikitaj aktoroj.

La lernotempo dividiĝis en kvar etapojn: la 1-a semestro estas ĉefe por ideologia edukado, la 2-a kaj 3-a semestroj ĉefe por subjektoj pri arto kaj tekniko, kaj la 4-a semestro estas doni al la studentoj okazajn por praktika sperto en filmlaborejoj.

La subjektoj studataj de la aktora kurso: Pri politiko estas la fundamento de marksismo-leninismo, la memdisciplino de junuloj, problemoj pri la ĉina revolucio, la evoluo de la socio, kaj aktualaj okazajoj kaj politikoj; tiuj pri arto kaj tekniko estas "Paroladoj de Prezidanto Maŭ en la Arta kaj Literatura Kunsido en Jen-an", la arta kaj literatura movado de post la 4-a de majo 1919,* fundamentaj scioj pri la arto kaj literaturo, fundamentaj scioj pri la kino, studo de la kino, skizo pri la historio de ĉina kino, studoj pri famaj filmoj kaj prezentado, kaj krome elparolo, danco, dramodeklamado, legado de selektitaj famaj verkoj, praktiko de sinalligo, kantado, gimnastiko, specialaj teknikoj kaj artoj kiel veturildirektado, glitkuro, naĝo, pafado, muzikludo ktp. En la praktikado, krom prezentado sur sceno de teatra aŭ kina dramo por ekzercado, la studentoj ankaŭ praktikas en filmlaborejo kaj

studentoj havigu al si revolucion vivkoncepton kaj la ideon servi al la laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj. Kiam la studentoj ĵus enpaŝis tiun lulilon de popola kino, multaj el ili revis por esti "filmstelo" kaj ankoraŭ ne deskuis la influojn ricevitajn en malnova Ĉinio. Nun post duonjaro da forĝado en la revolucia fornego tiuj malpuraj ideoj jam rapide forvaporiĝis.

En la pasinta jaro, multaj respondeuloj de la kina rondo venis lekcii en la lernejo, ekz. k-do Ŝih Tung-ŝan (史東山) donis lecionon pri "la karaktero kaj supereco de kino kiel arto-esprimilo", k-do Ju Min (于敏) pri la "Paroladoj de Prezidanto Maŭ en la Arta kaj Literatura Kunsido en Jen-an", k-do Vang Ĉeng-ĉih (王震之) pri "literaturo kaj politiko", k-do Laŭ Se (老舍) pri "studo pri populara arto", k-do Ma Jen-ŝiang (馬彥祥) pri "kiel apreci la malnovajn teatraĵojn", k-do Ju Ŝjue-vej (于學偉) pri "havu ĝustan concep-



Rikolto

SU KUANG

efektive partoprenas en la produktado de filmo. Ekster la lecionoj la studentoj ankaŭ ĉeestas prezentadon de filmo, teatraĵo kaj muziko.

La lernotempo en la dramaturgia kurso estas provizore tri jaroj. Post la finiĝo de la lernado la studentoj estos senditaj por praktikado al la laborejo de Dramo-Verkado de la Kina Buroo, kie ili laboros kiel material-kolektantoj k.a., kaj post du jaroj, tiuj, kiuj havos bonajn atingojn kaj kapablos memstare verki dramojn, promociiĝos al kvalifikitaj dramaturgoj. Por la dramaturgia kurso krom kelkaj fundamentaj subjektoj kiuj estas samaj kiel tiuj por la aktora kurso, ankaŭ estas jenaj subjektoj: politika ekonomio, historio de Ĉinio, la Historio de la Komunista Partio de USSR (B), tridek jaroj de la Ĉina Komunista Partio, kaj aliaj raportoj pri specialaj temoj, kaj estas jenaj subjektoj pri arto kaj tekniko: studo de arto kaj literaturo, la ideoj de arto kaj literaturo, studo de dramo kaj dramaturgio, ekzercoj de dramoverkado, analizo pri kina dramo, praktiko en dramo-verkado, ktp. Krome la aktora kaj dramaturgia kursoj havas gravan komunan subjekton de studo, nome vivo-spertadon.

En la lernado de la politika subjektoj, la lernejo unue postulas ke la

ton de popola aktoro", k-do Ĉeng Ĵin (成蔭) pri "memdisciplino de aktoroj", k-do Ĉeng Po-ĉang (鄭伯璋) pri "bazaj scioj pri la kino" k.a. Ĉiu leciontempo konsistas el tri horoj, unu por instruado, unu por preparado kaj unu ĝis du horoj por diskutado en grupoj. Kiam unu leciono estas lernita, sekvas konkludado pri la lernitaĵo. La direktantaro gvidas la lernadon tre rigore.

La studentoj nun daŭrigas la lernadon pri arto kaj tekniko. La ĉefa parto estas la elementaj ekzercoj de aktoroj, t.e. prezentado, elparolo, danco, gimnastiko, ktp., inter kiuj oni ĉefe lernas la prezentan sistemon de Stanislavski. De la elementaj ekzercoj oni progresas al studado pri muziko, kino, teorio de arto kaj literaturo ktp.

La prezenta arto de popola aktoro ne devas esti nur simpla tekniko, sed pli grave estas, ĉu li povas per sia prezenta arto vivece esprimi klasstarpunkton kaj-senton por la rigardantaron influ kaj eduki. Pro tio en la Kina Lernejo oni speciale emfazas ke arto kaj tekniko nepre devas obei politikon.

En la elementaj ekzercoj eĉ ĉiu moveto de la aktoroj estas postulata firme kunligiĝi kun politika sento, por altigi la idecon de la movoj. Oni kontraŭstaras ke aktoro izoligu

de la batalado de popolamaso kaj reduktigu al simpla "aktoro-metiisto". Pro tio la Kina Lernejo postulas al ĉiu studento de la aktora kurso mastri en du jaroj da lernado prezentan arton sur la bazo de marks-leninismo.

La elementaj ekzercoj de aktoroj iras tra diversaj etapoj, ekz. pli ol du monatoj por raciigo de prezentaj movoj, kaj ankaŭ ne malmulta tempo por koncentriĝo de atento. Multaj elementaj movoj, de la studado de tipa figuro ĝis la kreo de malgranda moveto, ĉiuj estas multfoje ripetataj. La direktantaro ankaŭ faras instruajn raportojn kaj provizas referencajn materialojn, por ke la studentoj studu pli profunde.

Grava programero kiu ligiĝas kun la arta kaj teknika lernado estas la studado de kinfilmoj kaj teatraĵoj, por profundigi la konon de la studentoj pri kina arto dank' al pristudo de multaj famaj filmoj enlandaj kaj sovietaj. Du fojojn okazas ĉiusemajne la studado de kinfilmoj. Filmon rigardinte la studentoj diskutas pri ĝi en grupoj kaj analizas la idean kaj artan karakterojn de la filmo, precipe la rolulojn. Tiuj regulaj studoj unuflanke helpas al la studentoj altigi sian nivelon de prezenta arto, kaj aliflanke instruas al la studentoj certan analizan kapablon por pli bone lerni la progresintan kinarton de Sovetio.

La studado de teatraĵo havas vastan kampon. En ĝi estas dramo, Pekina opero, akrobatado, bona loka opero, bona populara arto ktp. Kelktempe la studentoj kolektive vizitas diversajn ekspoziciojn. La plej frue varbitaj studentoj de la aktora kurso en la venonta printempo iros en fabrikojn kaj vilaĝojn aŭ partoprenos diversajn aktualajn laborojn por sperti la vivon kaj fari surscenejan praktikon, por intimiĝi kun la novaj homoj kaj novaj homokarakteroj en la nova vivo.

La Kina Lernejo estas revolucia fornego, en kiu la vivo estas vigla kaj serioza. La vivsistemo forte kontraŭstaras liberalismon. Jena estas la vivordo: matene je la 6-a ellitiĝo, 6.30-7.30 h. ekzercoj de elparolo kaj gimnastiko, 8.30-12.00 h. atm kaj 2.00-5.00 h. ptm. lernado, vespere 7.30-9.30 h. memlernado, kaj je la 10-a ellitiĝo. En la lernejo oni emfazas la organizecon, disciplinon, kaj grupan vivon. La studentoj de la Kina Lernejo, heredis la eminentan tradicion de revoluciaj lernejoj, sur la bazo de uneco kaj frateco sin interhelpas kaj interkuraĝigas, kaj fluge marŝas antaŭen sub la standardo de Maŭ Ze-tung.

La Kina Lernejo baldaŭ konstruos domojn en la ĉirkaŭurbo de Pekino, por malfermi en du jaroj ĉiujn kursojn kaj fakultatojn suprediritajn. Oni ankaŭ planas malfermi kurson de specialaj aktoroj, kurson de infanaj aktoroj, ktp. La hieraŭa Art-laborejo jam fariĝis la hodiaŭa Kina Lernejo, kaj, kun la rapida evoluo de la kultura konstruado de nova Ĉinio, en baldaŭa estonteco la hodiaŭa Kina Lernejo jam evoluos en kinan universitaton, la unuan en la tuta Azio.

La fondiĝo de la Kina Lernejo montras belan perspektivon en la brila evoluo de la kino de nova Ĉinio.

Trad. Espano

* Dato de studenta movado, de post kiu komencis la novdemokratia revolucio.

La Nova Ĉinio Komencis Ekstermi Akridojn Per Aeroplano

Akrida damaĝo ofte okazis en ĉina historio. Kiam la akridoj alflugas ili kovras la ĉielon kaj la sunon, kaj, forpasinte, lasis nuda vastan areon formanginte la grenojn kiujn la kamparanoj pene kulturis. Iun jaron antaŭ la Antijapana Milito, en Huanghua-Gubernio (黃驛縣) en Hopej-Provinco (河北省) la akridoj fariĝis tiel teruraj, ke ili eĉ formangis la fenestropaperon kaj mordvundis la orelojn, nazojn kaj vangojn de infanoj.

Pasinttempe, la Kuomintang - reakciularo kaj aliaj reakciaj regantoj nur sciis diversmaniere la kamparanojn eksploati, kaj kompreneble ne klopodis gardi la produktadon de la kamparanoj kaj malebligi la akridan damaĝon. Nun la Popola Registaro ne nur diversmaniere protektas kaj altigas la produktadon de la kamparanoj, sed ankaŭ helpas la kamparanojn forigi naturajn katastrofojn; la Popola Registaro ne nur mobilizas kaj organizas la popolamasojn al kaptado de akridoj, sed ankaŭ uzas ŝprucigilojn por disŝpruci ĥemiajn medikamentojn por ekstermi la akridojn, ĉijare ĝi eĉ provis uzi aeroplanon. En la printempo la Popola Registaro sendis aeroplanon bombrompi la glaciblokojn en Suejuan-Provinco (綏遠省) kaj sekve malebligis la okazontan inundon de la Flava Rivero. Ĉi tiaj grandaj entreprenoj povis efektiviĝi nun, ĉar la hodiaŭa registaro estas vere popola registaro, registaro servanta al la popolo. Tio ne estas disigebla de la prudenta gvido de la Komunista Partio.


De ĉi-jara somero la regionoj suferantaj de akridoj multe vastiĝis. Ekde majo akridoj aperadis sur la lagbordoj, marbordoj, senkulturejoj, kanejoj, stepoj, kaj aliaj lokoj en naŭ provincoj en Norda, Orienta, Centrasuda kaj Nordokcidenta Ĉinio, inter kiuj la akridoj furiozis speciale terure en Ŝantung, Hopej kaj Norda Anhuej (provincoj).

Por provo la Centra Popola Registaro decidis disŝuti per aeroplano pulvoron de "666" (benzena heksklorido—C₆H₆Cl₆) por ekstermi la akridojn en Huanghua-Gubernio en Hopej-Provinco kaj Sehung-Gubernio (泗洪縣) en Norda Anhuej-Provinco (皖北) en kiuj la akridoj plej furiozis kaj koncentriĝis. En la du gubernioj, post 15-taga laborado la aeroplano disŝutis pli ol tridek mil kilogramojn da pulvoro de "666-pulvoro" kaj ekstermis akridojn sur tridek mil muoj (1 muo=6.67 aroj) da tero. La efikeco de la pulvoro de "666" atingis pli ol 90%.

Disŝuti la pulvoron per aeroplano tre efikas por mortigi akridojn. La ekstermado de akridoj sur tridek mil muoj da tero daŭras 3 aŭ 5 tagojn se ni uzas mil manŝprucigilojn por disŝuti la pulvoron, kaj almenaŭ 3 tagojn se ilin kaptas tridek mil laboristoj. Laŭ la rezultato kiun ni ricevis post la unuafoja provo en Huanghua-Gubernio, po tago, unu aeroplano povas ekstermi per ses-

hora laborado akridojn sur 3.200 muoj da tero; unu manŝprucigilo povas ekstermi per sephora laboro akridojn sur ok muoj da tero. Tiel, seshora laborado de unu aeroplano dum unu tago egalas al sephora laborado de 400 manŝprucigiloj dum unu tago.

Kompreneble, estas nur komenca provo ĉifoja ekstermo de akridoj per aeroplano. Ĉi havis jenajn sukcesojn: unue, ĉifoja provo pruvis, ke la ekstermo per aeroplano efikas por



ambaŭ akridoj kaj akrididoj; due, en ĉi-foja provo ni akiris tre valorajn elementajn spertojn kaj eltrejnus nombron da novaj kadroj; trie, ĉiuj fakuloj, profesoroj, studentoj, teknikistoj kaj diversaj kadroj, kiuj partoprenis ĉi tiun laboron, praktike lernis multan novan scion kaj teknikon; kvare, ĉar la Popola Registaro tiel atentis pri ĉi-foja akrida dama-

(daŭrigo de p. 81)

Subjugado de Huaj-Rivero

bezonis 20,000 kubmetrojn da sablo. La Popola Registaro de Kiaŝan-Gubernio (嘉山縣) ricevinte la sciigon tuj organizis civillaborantojn, kaj sub la gvido de la respondecaj kadroj, en 35 tagoj la bezonata kvanto da sablo estis ĝustatempe liverita al la loko. Oni bezonis multajn kuracistojn por kuraci malsanulojn kaj malebligi epidemion inter la laboristoj; la Centra Popola Registaro tuj sendis el Orienta, Suda kaj Centra Ĉinio sep brigadojn de kuracistoj kaj flegistinoj, kiuj kune kun la lokaj kuracistoj organizis "Armeon en Blanka Kostumo."

En tiu ĉi granda laboro, helpe de la progresintaj spertoj kaj metodoj de Sovetunio, multaj malfacilaĵoj estis konkeritaj. Se ni faris laŭ malnova teknika vidpunkto kaj malnovaj sperto kaj metodo la unua etapo de la subjugado de la Huaj-Rivero ne nur ne povus kompletigi en tiel mallonga tempo, sed ĝi ankaŭ estus absolute neebla. La konstruado de Junhoki-kluzo estas bona ekzemplo.

Estis treege malfacile konstrui kluzon 1.300 metrojn longan kaj 200 metrojn larĝan en tri monatoj. Laŭ la malnova metodo por konstrui tiun grandan kluzon oni devus meti almenaŭ 12,000 palisojn kaj 10,000 kvadratajn metrojn da lignaj tabuloj. Sive por meti tiom da palisoj oni bezonas duonon da jaro. La palisoj kaj tabuloj nepre devas esti el Usona pino; la pordejoj de la kluzo nepre devas esti produktaj de Anglio. Sed

ĝi ne nur mobilizis la popolamasojn al la kaptado de akridoj, sed ankaŭ faris novajn klopodojn por ekstermi la akridojn, precipe per la popola aerarmeo, tiel la vastaj popolamasoj ekvidis, ke nia popola aerarmeo ne nur defendas la landon kaj ekstermas la malamikojn sur batalkampo, sed ankaŭ partoprenas en la ekstermado de akridoj—en la granda laboro batali kontraŭ natura katastrofo, sekve ili pli konvinkiĝis, ke la hodiaŭa registaro estas vere registaro servanta al la popolo.

Kiam la aeroplanoj por ekstermi



akridojn alteriĝis sur la aviadilejo de Huanghua-Gubernio, la loĝantoj de la gubernio okazigis bonvenigan kunvenon kun pli ol mil ĉeestantoj. En la kunveno parolis labormodelo

Ni Peng-ŝeng (倪彭盛), popola reprezentanto de la tuta gubernio: "En la pasinteco kiam akridoj furiozis, kiu pensis zorgi pri ni? Nun la Centra Popola Registaro sendis aeroplanojn por helpi nin ekstermi la akridojn. Tio diras al ni, ke nur ĝi estas nia propra registaro. Tia fenomeno povas okazi nur sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio." Li daŭrigis: "Ni havis antaŭe en Huanghua-Gubernio kvar malbonojn: banditoj, bienulotiranoj, inundo kaj akridoj. Sub la gvido de la Popola Registaro ni forigis la banditojn, bienulotiranojn kaj inundon. Kaj nun Prezidanto Maŭ sendis aeroplanon helpi nin forigi la lastan malbonon."

En Sehung-Gubernio en norda Anhuej, kiam la kamparanoj vidis ke la akridoj grandamase teren falas venenitaj de la pulvoro disŝutita per aeroplano, ili eksciis ke la ekstermado de akridoj per aeroplano vere estas efika, kaj pro tio kun granda entuziasmo aplaudis kaj kore dankas la Popolan Registaron. Multaj eĉ ŝparis sian ĉiutagan porcion de nutraĵoj por aĉeti ovojn, peklitajn fiŝojn, abrikotojn ktp. por donaci al la laborantoj. Virina labormodelo Onjo Tu (杜大娘) diris: "Antaŭe, la aeroplano de Kuomintang venis nur por ĵeti bombojn, sed hodiaŭ la popola registaro sendis al ni aeroplanon por ekstermi akridojn; ni devas bone labori en la produktado por danki Prezidanton Maŭ!"

trad. Jungsen Jang

Kluzo de Junhoki, la laborantoj sub la slogano "Vetkuro kun la inundakvo" laboris tage kaj nokte. La meĥanikistoj el Ŝanhajo por instali la kluzan pordon laboris tuttage en tiel varmega vetero de pli ol 100° F kaj en pluvo. En la komenco instali unu olepneumilubon sur la kluzpordo bezonis tri horojn, sed iom poste instali tri tubojn bezonis nur unu horon. La vinktofiksisitoj bezonis 12 horojn por najli sur unu kluzpordon ĉirkaŭ 10,000 najlojn, sed poste ili bezonis nur 5 horojn. En la malfacilega laboro de drago ĉe la Suj-Rivero (淮河), 300,000 laborantoj necedeme bataladis en akvo. Ili ĉiuj paciencie laboradis malgraŭ ke iliaj piedoj kaj manoj estis tranĉvunditaj per la akraj zingibrosimilaj ŝtonoj grandaj kaj malgrandaj. Por elĉerpi la akvon el la fosita kanalo 60 kilometrojn longa, ili laboradis senĉese per pli ol 400 akvoradoj kaj pli ol 4,000 siteloj.

Estas ne necese preparoli pluajn ekzemplojn. La diritaj faktoj jam klare priskribis la mirindaĵon de la unuajara sukceso en la subjugado de Huaj-Rivero, kreitan de 3,000,000 laborantoj, kamparanoj, teknikistoj kaj kadroj laŭ la slogano de Prezidanto Maŭ Ze-tung. "Ni Nepre sukcesus en la subjugado de Huaj-Rivero," sub la unuigita gvidado de la Komunista Partio kaj ĉiugradaj lokaj popolaj registaroj, kun la helpo de la progresintaj spertoj de Sovetunio, kaj per la senkompara fervoro kaj saĝo de la laboristoj.

En la laboro de la subjugado de Huaj-Rivero oni povas vidi la konkretan belegan perspektivon de nova Ĉinio!

W. S. Ho

ŜANHAJA EKSPOZICIO PLIVIGLIGAS NEGOCON

Sih Haŭ (詩豪)


Antaŭ nelonge mi pasigis tutan tagon vizitante la plej grandan ekspozicion en la historio de Ŝanhajo. Ĝi estis ekspozicio celanta elmontri al la ĝenerala publiko kaj komercaj entreprenistoj grandegan aron da produktoj kiujn produktas ĉinaj revivigitaj industrioj, agrikulturo kaj metioj. La ekspozicio estis tre interesa kaj mi sentis ke unu tago ne estas sufiĉa por la vizito—oni eĉ povas pasigi tie tutan semajnon.

La ekspozicio okupis pli ol 40 hektarojn da tero en la malnova Ĉeval-vetkurejo meze de la urbo kaj konsistis el 16 salonegoj. Pli ol 10,000 ekspoziciaj estis elmontrataj per geniaj aranĝoj kaj ili enhavis ne nur diversajn specojn de modernaj maŝinoj kun iliaj produktoj sed ankaŭ grandan mozaikon da belaj kamparanaĵ metiaĵoj.

Fiŝoj kaj aliaj manĝaĵoj el riveroj kaj maroj estis montrataj en granda modelo de fiŝ-boato. Parto de la te-ekspoziciaj estis urbo-muro konstruita el te-brikoj. Animalaj pro-

duktoj estis elmetataj en salonego kiu havis la formon de Mongolia tendo. En la silk-salonego estis

pupoj elegante vestitaj per silk-fabrikoj reprezentantaj la tradiciajn naciajn kostumojn de Sovetunio



INAŬGURO DE LA EKSPOZICIO

Katolika Vartejo en Vuĉang

Vu Jun-fu (伍雲甫) kaj Ĉu Venĵaŭ (朱文堯)

Same kiel en la urboj Nanking (南京), Kanton (廣州), Hangĉoŭ (杭州), Kancoŭ (漢州) kaj Ĉung-king (重慶), ankaŭ en la urbo Vuĉang (武昌) estis malkovrita la krimo de Usonaj imperiistoj turmentmortigadi ĉinajn infanojn sin maskante per filantropio.

En 1928, Usonaj imperiistoj de Huajuanŝan (Cardena Monto 花園山) de Vuĉang, fondis hombuĉejon—katolika vartejo. Ĝis nun en la daŭro de 23 jaroj, tie estis turmentmortigitaj 16,000 ĉinaj infanoj. La kadavroj de la infanoj estis enterigitaj ĉe la montpiedo post la vartejo. Nun oni jam elfosis la ostpecojn de mano, piedo, kranio, kiuj plenigis kelkajn grandajn ĉerkojn. La fondinto de la vartejo estis Usona episkopo de Vuĉang-diocezo, kiu sin nomis ĉinlingve Aj Juentaŭ (艾原道). En 1946, du agentoj de la Usonaj imperiistoj, episkopo kaj vic-episkopo de Vuĉang-diocezo, Kuo Ŝe-ĉi (郭時濟) kaj Ŝju Laj-te (徐養德) heredis la sangan entreprenon. La

granda. Iu laboranto kiu enterigadis en la vartejo la infanojn diris ke li faradis fosojn ĉirkaŭ ses futojn longajn, du futojn profundajn kaj du futojn larĝajn kaj ĉiu tia foso pleniĝis en nur 10 tagoj per kadavroj. La vortoj de monahinoj kaj laboristoj en la vartejo certigas, ke la vartejo ĉiutage ricevis 2-4 infanojn meznombro en la pasinteco. En unu jaro, do devis esti ricevataj 700 infanoj, kaj pli ol 16,000 en 23 jaroj. Sed nun restas nur 105 infanoj, orfinoj, kaj postvivantaj junuloj. Tio

de la infanoj ruĝe pusis. La malpurajo sekigiĝis sur la dorso kaj fine estis deskrapita kune kun haŭto kaj karno. Pnevmonio, intestaj kaj stomakaj malsanoj, trahomo, ulcero kaj aliaj infektmalsanoj atakis preskaŭ ĉiun infanon. Ili malgrasiĝis, pusis, unuj ne kapablis iri kaj paroli, aliaj pezis nur 1½ kg. je 3-jara aĝo! Pli poste ili estis forjetataj en senluman kelon kaj mortdataj de ĉusoj je okulo kaj nazo. La mortintoj estis vice kaj eĉ tavolo enterigitaj ĉe la montpiedo.

La Usonaj murdistoj unuflanke mortigadis la plejparton de la ricevitaj infanoj, aliflanke maturigis kelkajn el ili por ekspluati laboradon senpagan. Ankorau ne atingante sian aĝon 10-jaran la infanoj devis labori 16 horojn ĉiutage. Ŝju Laj-te, la malhoma estajo, unufojon enpoŝigis la tutan espezon 300,000 juanoj, kiun akiris la infanoj de jan. 1950 ĝis apr. 1951, per lavado kaj aliaj laboroj por eksteruloj.

El kvindek kelkaj orfinoj kiuj eltenis la turmentadon de Usonaj religiuloj kaj hazarde ĝis nun vivantaj, reastas: 7 idiotoj, 3 lupusuloj, 3 kun vizaĝoj difektitaj de varioloj, 3 nerv-malsanuloj. Al iu infano ses- aŭ sepjaraĝa, ankorau neniu dento elkreskis. La Usonaj imperiistoj certe venenis ilian konscion, ke ili konas ne patron, sed nur la "filantropion de Usonanoj". Al ili la Usonaj monahinoj diris: "Kiu vivas ne-pretendema, tiu levigos ĉielan post la morto." Do kiu "pretendi" aŭ ne obeis, tiu devis ricevi satbaton aŭ estis devige edzinigata al fremdulo. La Usonaj monahinoj lin klasifikis en 5 gradojn: orfo, lernvolanto, provlernanto, komencanto kaj monah(in)o. Inter tiuj 5 klasoj interparolo kaj interrilato estis malpermesataj. Pri la vartejo ili estis permesitaj nenion diri al eksteruloj kaj al tiuj ĉi viziti la vartejon estis malpermesate.



efektiva laborado de la vartejo estis gvidata de kvin Usonaj monahinoj, kiuj tuj antaŭ la liberigo de Vuĉang senespere forkuris sialanden, kaj transdonis la aferon al 18 ĉinaj monahinoj, kiujn gvidis mem Kuo Ŝe-ĉi kaj Ŝju Laj-te. Kial la Usonaj imperiistoj ne volis forlasi la vartejon? El la raporto kiun skribis Kuo Ŝe-ĉi al Usona eklezio, ni povas scii, ke ili per la "vartejo" aŭ "orfejo" realigis sian intrigon grandskale mortigi niajn infanojn. La raporto diris: "La vartejo celas savi animojn. De la jaro 1924, ĉiutage multe da animoj ĉieleniris." "Tiu ĉi laboro estas nia fonto de konsolo kaj plezuro." La procento de mortintaj infanoj en la vartejo estas terure

signifas ke mortis pli ol 99% de la infanoj. La granda procento de mortintaj infanoj estas montrataj ankaŭ en raporto, kiun sendis la vartejo al Usono: "De 1920 ĝis 1940 ĉe Huajuanŝan kaj Huangŝekang (黃石港) sume 40,000 animoj ĉieleniris."

La agado de la murdistoj estas ekstreme kruela kaj sovaga. La vartejo ampleksas ĉe Huajuanŝan 9,672 kvadratajn futojn, sed la ejo por "varti" estas nur du ĉambretoj okupantaj ne pli ol ducent kvadratajn futojn. Kiam nova infano eniris la vartejon, ĝi estis kunlogigita kun la aliaj, kiuj estis turmentite malsanaj. En la ĉambroj estis naŭze kaj malpure. Ŝmirate de fekaĵo kaj urino la haŭto de akseloj kaj postajoj

(daŭrigo sur p. 80)

kaj nov-demokratioj. Tiuj landoj nun estas favoraj klientoj de tiu ĉi bone konata produkto de Ĉinio. Meze de la planko de metiaĵo-salonego ankradis vaporŝipo "Liberio" vojaĝanta al orienta Eŭropo kun sia ŝarĝo de tiaj metiaĵoj kiel broditaj subvestoj, pasamentoj kaj fotatoj, belaj tapiŝoj lakitaj varoj, kloisoneaj varoj kaj eburaj kaj kristalaj skulptaĵoj.

La ekspozicio allogis eksterordinare grandegan amason da vizitantoj ne nur el la 5 milionoj da loĝantoj de Ŝanhajo sed ankaŭ de komercaj delegitaroj de multege da ŝtat-kaj privat-posedataj entreprenoj de aliaj urboj kaj provincoj. 114,000 homoj paŝis en la pordon je la tago kiam malfermiĝis la ekspozicio.

Tiu ĉi ekspozicio ne estis ordinara komerca afero sed estis gaja okazintaĵo en la vivo de la loĝantoj de Ŝanhajo. Ĝi simbolis ilian triumfon en la lukto kontraŭ la blokado fare de Usonaj imperiistoj. Ĝi signifis la sukceson en la reordigo kaj disvolvado de ĉinaj industrioj. Ĝi ankaŭ servis kiel rimarkinda pruvo ke dum la mallonga periodo de du jaroj post la liberigo Ŝanhajo ne plu estas duonkolonia urbo dependanta de fremdaj krud-materialoj kaj merkatoj sed jam forigis ĉiujn imperiistajn influojn kaj preskaŭ tute fariĝas ekonomie sendependa.

La plenumado de agrara reformo en Orienta Ĉinio liberigis 100 milionojn da kamparanoj el la jugo de feŭdismo. Nun ili posedas sian propran teron, ilia produktado plimultiĝas, ilia vivo pliboniĝas kaj ili formas grandan enlandan merkaton—tio estas grava faktoro por pretigi la vojon al industria disvolvado.

Unu el la ĉefaj celoj de la ekspozicio estis stimuli la interfluon de komercaĵoj inter urbo kaj kamparo. Do estis nature ke ĉiuj vojoj en la ekspoziciejo alkondukas al la komercaj-interflua salonego kie estis montrata kolekto da modeloj, bildoj kaj grafikaĵoj kiuj vivece klarigas la novan komeron de Ĉinio, dum en la aliaj 15 salonegoj oni trovis nur lokajn produktojn.

Kiam mi eniris tiun salonegon mi nerezisteble direktis mian rigardon al la grandega mapo de la Popola Respubliko de Ĉinio sur kiu estis indikataj la diversaj regionoj kie troviĝas riĉaj produktoj. Apude estis grafikaĵoj kaj bildoj kiuj montris ke rezulte de agrara reformo 300 milionoj da kamparanoj nun posedas sian teron kaj ke la registaro elspedas la plej grandan monsumon en ĉina historio por akvo-konservado kaj aliaj hidraŭlikaj konstru-laboroj. En multaj manieroj la registaro helpas la kamparanojn pligrandigi ilian produkton. Tiamaniere la produkto de provizajoj lastjara estis 20 procentojn pli granda ol la antaŭlastjara. La produkto de kotono espereble plenumos la bezonon de teksindustrioj antaŭ la fino de la venonta jaro. Lokaj produktoj kaj metiaĵoj tiel plimultiĝas ke ili reprezentas 30 procentojn de la tuta espenzo de la kamparanoj. La superproduktado de ĉio ĉi tio en diversaj lokoj kreas brilan estecon por komerco en tiu ĉi vasta lando.

Alia kolorigita mapo elmontris la rimarkindan progreson de la negocado pri lokaj produktoj dum la mallonga periodo de malpli ol du jaroj de post la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio. En Nordorienta Ĉinio famaj orangoj produktataj en Huangjen (黃巖) de Ĉekiang-Provinco (浙江省) havas vastan merka-

(Daŭrigo sur p. 86)

La Tero

Ĉaŭ Ŝu-li (趙樹理)

Redukto de ter-lupago* okazis en Vangkiaĉuang (vilaĝo de Vang-familio 王家莊). Iun tagon oni solvis la disputojn inter Vang Kvara (王老四), la terposedanto, kaj liaj farmistoj. Kiam la prezidanto de la kamparana asocio demandis Vang Kvaran, ĉu li havas ankoraŭ opinionon.

"Tio estas leĝo, kian opinionon mi povus havi kontraŭ ĝi?" respondis Vang Kvara.

"Sed leĝoj baziĝas sur racio," diris al li la vilaĝestro. "Ni ne nur plenumas la leĝojn, ni devas ankaŭ zorgi ke vi komprenu la justecon de la leĝoj."

"Mi parolu sincere, kompreni mi ja ne povas," diris Vang Kvara kun ĝemspiro. "Mi prenas de ili lupagon, ĉar ili faras mian teron, do kial estas juste nur kiam mi ricevas malpli? Mi devas zorgi pri la farmistoj, kial ili ne prizorgu min? Mia multmembra familio vivtenas sin nur per tiu iometo da lupago. La antaŭlastan jaron okazis sekeco, mi ricevis nenion el la tero kaj la tuta gren-rezervo estis konsumita. Pro tio mia jara enspezo neniam povis kovri la elspezon. Sed kiu ja zorgis pri mi? Do kial nur mi devas zorgi pri la aliaj?"

La prezidanto de la kamparana asocio kaj la distrikta kadro klarigis al li, ke greno ne venas de tero sed de laboro, kaj demandis poste ĉu li jam komprenas.

"Kontraŭ laŭleĝa redukto de lupago mi havas nention por diri," respondis li. "Sed laŭ rezono mi ne povas konsenti vian argumenton. Vi diris, ke ili ricevis ĉion de laboro, do ili redonu al mi la teron kaj produktu en la aero. Vi kuraĝigas pensliberon kaj estas mia libero tiel pensi. Ĉe post mil jaroj mi ne samopinios kun vi."

Vizaĝe al li stariĝis Vang Tria (王老三), la instruisto de la elementa lernejo kaj parolis al li:

"Kvara, ne menciuj la teron! Ekparolante pri ĝi, mi estas plena de koleri!"

"Vi bone scias, kiel statas mia terpeco ĉe Ĉangkiaĉaŭ (la kavbo de Ĉang-familio 張家窩). De la supro ĝis la piedo estas ruĝa tero miksitita de sablo. Kvankam en la malnova dokumento ĝi estis priskribita kiel peco de dezerta monto, tamen, laŭ la diro de niaj patroj, kiam ĝi estis luigita al la avo de Laŭ Ĉang (Maljuna Ĉang), pli ol tridek muoj da bona tero estis kulturitaj dum dek jaroj. Poste venis Laŭ Vang (老王) kaj Laŭ Sun (老孫). Tri familioj kunvivis en la sama vilaĝeto. En la generacio de Laŭ Ĉang, la kulturita areo de la tri familioj ensume atingis cent muojn. Mi ne scias, kiom da greno ili rikoltis sed nur por lupago mi ricevis ĉiujare sesdek tan-ojn (1 tan=1 hektolitro). Sed nun ne diru sesdek tan-ojn, kiu ja donus al mi ses ŝeng-ojn (1 ŝeng-o = 1 litro)?"

"Antaŭ du jaroj, krom la damaĝoj, kiujn kaŭzis japanoj kaj la bandita trupo de Ki Ĉenkuej (姬鎮魁), okazis sekegeco. Pasis jam mez-somero, sed ne venis pluvo kaj la tero estis tute ruĝa. Ĉu vi ne scias? El pli ol ducent familioj en nia vilaĝo restis nur tri- aŭ kvar-dek, la aliaj aŭ mortis aŭ elmigris. Ĝuste en tiu tempo Laŭ Ĉang venis al mi por prunti iom da greno, dirante, ke Laŭ Vang kaj Laŭ Sun ne povis plu elporti malsatan kaj elmigris kun siaj familianoj. Poste Laŭ Ĉang mortis je malsato kaj lia edzino reiris al Lin-Gubernio (林縣) kun sia infano. De post tiam la vilaĝeto restis senhoma. Mi forte pentis, ekmemorante pri ĉio ĉi. Mi devis pruntedoni al li iom da greno."

"En septembro de la sama jaro, ĉu ni ne rifuĝis al Ĉangkiaĉaŭ, kiam la Okavoja Armeo venis ataki la japanojn redutojn? Vi ja bone scias: kvankam dum la unua duonjaro oni ne prisemis, tamen dum la dua pluvadis daŭre, la abrotano kreskis sufiĉe alte, ke la terpeco estis konvena ŝirmejo por homoj. La domoj en la vilaĝeto estis forlasi-

taj. Konvolvuloj enrampis tra la fenestroj kaj sur la ĉefa trabo pendis vespa celaro, tiel granda kiel rizvazo. Ĉiuj laciĝis kaj dormis ronkante sur la tero, nur mi maldormis la tutan nokton. Imagu, mi havis en mia vilaĝo nur tri muojn da legom-gardeno, ĉu ĝi utilis por io? La ĉiujara elspezo por mango kaj vesto ja venis de la cent muoj da grenkampoj ĉe Ĉangkiaĉaŭ. Nun mi vidis, ke ĝi kreskigas nenion krom abrotano, mi sentis, ke mia koro jam duone glaĉligas.

"En tiu aŭtuno, kompreneble, neniu pagis al mi eĉ unu grajnon. Homoj kiel ni kutimis vivi grandstile. Kiel la proverbo diras: 'La sonorilo estas en la templo, sed ĝia sono disaŭdiĝas eksteren vaste.' Foje vi vivas pompe, estas ne-facile denove vivi modeste. En la vintro mia filino edziniĝis. La donaco, la doto, la festeno, la vizito de la nova bofilo, la hejmenreveno de la filino je la naŭa tago post la edziniĝo: ĉio ĉi kostis al mi multan elspezon, ĉar mi, pro vanteco, ne volis montri mian financon malfacilaĵon. Dum la malpacaj jaroj, eksplutatis la japanoj diabloj kaj rabis Ki Ĉankuej, do kiom povus resti el la ŝparita greno? Ĝin konsumis kaj la ĉiutaga vivtenado kaj la elspezo dum la edziniĝa festo. Ĝi baldaŭ elĉerpiĝis. Mono estas serioza afero. Vanta eksterajo ne povas teni sin longe. La grenujoj malpleniĝis unu post alia. Mi maltrankviliĝis. Antaŭ ol la jaro finiĝis, mi maldungis ĉiujn servantojn kaj la kuiriston."

"La sepjara knabo povis fari nenion krom manĝi. Mia edzino vivis ĉirkaŭ kvardek jarojn, sed scipovis nur sidi sur la briklito atendante, ke oni portu al ŝi manĝaĵon. Miaflanke, mi neniam eliris sen ĉevalo. Tiaj tri homoj vivis kune. Jam ne parolu pri produktado, eĉ se iu donus al ni ion nekuiritan, ni ne scipovus ĝin kuirji. Mia edzino tute laciĝis pro la kuirado kaj balaado, dume manĝi la ĉevalon kaj aĉeti oleon aŭ legomon faris min tute okupata. La tutan posttagmezon ni duope ne povis tranĉi eĉ du faskojn da fojno. Por muelado ni devis dungi provizoran laboriston."

"Pasis la jarfino. Ni invitis la bofilon pasigi ĉe ni la novjaron ĝis la festa tago de la dek-kvina de 1' unua monato. La grenujo mal-

(daŭrigo de p. 85)

Ŝanhaja Ekspozicio.....

ton kaj en Ŝanhajaj frukt-butikoj estas vendataj pomoj produktataj en Nord-oriento. Bonekonataj silkajoj produktataj en Suĉoŭ (蘇州) kaj Hangĉoŭ (杭州) plenumas la bezonon de la loĝantoj de Sinkiang-Provinco (新疆省) kaj la fama lando de la nordokcidentaj provincoj fariĝas grava krudmaterialo por la teksejoj en Ŝanhajo. La dikaj bambustangoj produktataj en Hangĉoŭ trovas multajn aĉetantojn en la Nordoriento. Te-brikoj de Centra-suda Ĉinio venas al Interna Mongolio. Sunflor-semoj produktataj en Nordoriento estas frandajo por la loĝantoj de Kantono. Unu el la grafikajoj montris ke la komercado pri medikamento, konstru-materialoj, meti-produktaĵoj kaj nutraĵoj en Ŝanhajo plimultiĝis de 100 procentoj dum la unua duonjaro de 1950 ĝis 182 procentoj dum la periodo de decembro, 1950 ĝis marto, 1951.

Aliaj bildoj klarigis kiel la registaro klopodis antaŭenpuŝi la negocadon pri lokaj produktoj. Ŝtataj komerc-organizoj fiksis la prezojn de tiaj ĉiutagaj necesajoj kiel rizo, ŝtofo, karbo, manĝ-oleo, sukero kaj salo por garantii stabilecon de generalaj varprezoj. Samtempe la registaro difinis justan proporcion inter la prezoj de kotono kaj rizo por garantii la profiton de riz- kaj koton-produktantoj. Mi vidis amason da komercistoj starantaj antaŭ granda mapo lumigata de neon-signo kaj manifestanta ke oni povas gajni 10 procentojn da profito transportante

220 funtojn da aluno de Pingjang (平陽) en Ĉekiang-Provinco norden al Ŝanhajo kaj 11 procentojn da profito transportante pecon da pajlomato de Ningpo (甯波) al Ŝanhajo. Plua aro da grafikajoj kaj bildoj



LA ENIREJO DE LA METIAJO-SALONEGO

ilustris kiel la doganaj kaj impostaj aŭtoritatoj helpas antaŭenpuŝi la interflon de lokaj produktoj. 88 enlandaj impostoj longe ekzistintaj sub la regado de Kuomintang estis nuligitaj en januaro de 1950. Pro la simpligo de labor-metodo la eksport-komercistoj bezonas nur 3 horojn por plenumi necesan limimpostan proce-

don kiu postulis tutan tagon antaŭ liberigo.

Kontraŭe al la estinta tempo sub la regado de Kuomintang la kamparanoj ne plu pagas industriajn kaj komercajn impostojn, kiam ili vendas siajn produktojn. Tiuj vendejoj kiuj komisiite aĉetas kaj vendas lokajn produktojn devas pagi nur

cistoj pagas 42 procentojn malpli alte ol en junio de 1949. La popola Asekura Kompanio siaflanke malplialtigas la asekur-pagojn por plivigli produkt-interflon. Ekzemple, asekurigante la transportadon de produktoj inter Ŝanhajo kaj Tienzino oni pagas 37.5 procentojn malpli alte ol en la tempo de Kuomintanga regado.

Plej rimarkindaj estas la servoj fare de la Unuigita Transport-kompanio kiu organizis ĉiujn transportilojn. Ties servoj konsistas el simpligo de procedoj, rapida kaj sekura liverado kaj moderaj transport-pagoj. Unu el la modeloj vivece elmontris kiel la 4,500 tunoj da teo produktita en Tapie-Montregiono de Suda Anhuej-Provinco (皖北) estas alportataj al Ŝanhajo kaj Tienzino per diversaj specoj de primitivaj kaj modernaj transportiloj: ŝarĝo-stangoj, puŝĉaroj, bambu-flosoj, jonkoj, bov-kaj ĉeval-ĉaroj, motor-ŝarĝavagonoj kaj vagonaroj.

Apud la elirejo de la ekspozicio pendis granda ole-pentraĵo montranta aron da fabrikaj fumtuboj sur unu flanko kaj belan kamparon sur la alia kaj antaŭ ili kamparaninon portantan garbon da ora tritiko kaj junan laboriston fingromontrantan al la lazura ĉielo. Efektive pro la plivigliĝanta interfluo de lokaj produktoj, la brila estonteco de nova Ĉinio prezentita en tiu pentraĵo estas jam antaŭvidebla.

Trad. I. K.

* urbomuro: muro ĉirkaŭ urbo.

plenigis videble. Ni forte maltrankviligis. Laŭ mia opinio, ni tuj transloĝiĝu al Ĉangkiajau por kulturi la teron, sed mia edzino malkonsentis. 'Estas timinde vivi triope en tiu soleca loko,' diris ŝi. La unua monato estis baldaŭ pasinta, la najbaroj jam komencis sterki la kampojn. Mi diris al ŝi: 'Do ni turnu la legomgardenon en grenkampon. Ĝi estas fekunda tero apudvilaĝa kaj donos bonan rikolton. Se ni vivus ŝpareme, la tri muoj da tero sufiĉus por nia vivtenado.'

"Ŝi konsentis. La sekvantan tagon mi vizitis la teron. Tigoj de kapsikoj kaj melongenoj staris dense. Mi intencis tuj sterki ĝin post ioma sarkado.

"Frato, mi rigardis la aferon tro facila. Kiu ja ŝcias, ke terlaboro estas neniel simpla afero. Provu mem, se vi ne kredas! Nur la malmultaj bedoj da melongenaj tigoj kostis al mi tutan antaŭtagmezon. Ili ne cedis al la falcilo. Se mi hakis per hakilo, ĝi fleksiĝis al la oriento, kiam mi hakis je la okcidento. Se mi fosis per pioĉo, ĝi ne povis atingi la radikojn tro profundajn en la tero kaj cetera ankaŭ la branĉoj malhelpis vian pioĉon. Tri foje mi kuris hejmen por ŝanĝi la ilon, sed ĉiuj tri maltaŭgis.

"Fine mi ektrovis rimedon. Unue mi kavigis la teron je unu flando per pioĉo, poste premis la stigon sub piedo kaj hakis per hakilo. Post tre longa tempo mi ankoraŭ ne finis unu bedon. Jen revenis Kanĉjo (小剛) nia najbaro, de la kampo portante grenkorbojn. Vidante, ke mi ŝvingas ambaŭmane la hakilon por haki melongenajn tigojn, li ridegis tiel laŭte, ke li apenaŭ povis fermi sian buŝon. Mi ne kuraĝis levi la kapon pro honto. Sat-ridinte li diris al mi, ke ne necesas tiom da peno. Li formetis la korbojn, transprenis la pioĉon kaj montris al mi kiel ilin elradikigi. Mirindege! La branĉaro tute ne ĝenis lin. Kiu estis tuŝetita de la pioĉo, tuj rompiĝis. Simple donante ekzemplon li elsarkis tutan bedon, tio estas, tiom kiom mi faris la duonan antaŭtagmezon. Li formetis la pioĉon kaj foriris kun la grenkorboj. Tiam mi laboris laŭ lia ekzemplo. Nun mi ankaŭ scipovis. Sed li elsarkis unu tigon je unu aŭ du botoj, dum mi ne sukcesis eĉ per kvin aŭ ses. Post mallonga tempo veziketoj estiĝis sur miaj manplatoj. Mi daŭrigis la sarkadon kun kunpremitaj dentoj kaj finis nur je la tagmezo. Post tagmanĝo ambaŭ la brakoj kaj gamboj doloris. Mi dormis la tutan posttagmezon.

"La sekvantan tagon mi intencis sterki la teron. Mi ne povis kolekti la sterkon pro brakdoloro. Do mi sendis mian edzinon. Tio forte embarasis ŝin. Ŝi portis blankajn ŝuojn, ĉar ŝi funebris la morton de sia patrino. Mi diru al vi la veron, sed ne ridu, frato! Kiam la ŝuoj estis sur ŝiaj piedoj, ŝi ne permesis la flankon de la plandoj esti malpurigita eĉ de nigra makuleto. Ĉu ŝi volotus kolekti sterkaĵon? Tamen la sterkaĵo nepre devis esti kolektita kaj por rifuzi ŝi ne havis pretekston. Ŝi vole-nevole eniris la ĉevalstalon kun ŝpato. Ŝi iris tre malrapide. Ĉiun paŝon ŝi faris singarde, metante la piedon sur sensterkan lokon tiel zorge pri la blankaj ŝuoj. Mi rigardis post ŝia dorso, sed ne kuraĝis ridi. En pasintaj jaroj, la servisto prenis la sterkon el la stalo kaj dispecigis antaŭ ol porti al la legomgardeno. Tiun jaron la servisto estis maldungita, kaj kompreneble neniu dispecigis la sterkon. Ŝi prenis la ŝpaton kaj ne sciis kion fari. Ŝi ne povis enpuŝi la ŝpaton vertikale. Horizontale, ĝi traglitis sur la supraĵo. Do ŝi turnis la ŝpaton malsupren kaj skrapis, tamen ŝi ne sukcesis pli bone. Malfeliĉe la paro da blankaj ŝuoj enprofundiĝis en la sterkon. Ne ridu, frato! Divenu, kion ŝi faris! Ŝi forjetis la ŝpaton kaj kuris el la stalo rapideme. Ŝi piedfrapadis, deskuis kaj viŝis per poŝtuko. Mi ne povis reteni min de rido. Ju pli mi ridis, ŝi des pli koleris. Sur la ŝuoj restis ankoraŭ multe da flavaj punktoj post longtempa frotado. Cetero, veziketo jam estiĝis sur ŝia mano. Ŝi kuris domen kun elpuŝita buŝo. Kiam oni ofendis la edzinon, la laboro nature falas sur lin mem. Sed

mi ne laboris pli bone ol ŝi. Mi ne sukcesis enpuŝi la ŝpaton vertikale aŭ horizontale. Poste mi puŝegis ĝin kontraŭ la amaso kaj fine defrapis kelkajn pecegojn. Mi timis, ke estus malfacile meti en la korbon, se mi dispecigus ilin. Do mi enkorbegis la pecojn unu post alia ne rompinte. Mi ne vidis, ke mia penego pruvigas tute vana. La ĉevalo estis preta, sed neniu helpis min levi la korboparon. La edzino ĵus ofendiĝis, kaj ne venos kompreneble je mia helpvoko. Eĉ se ŝi venus, ŝi povus doni nenian helpon. La najbaroj ne estis hejme. Mi staris senkonsile. Mi ĝisatendis la revenon de Kanĉjo de sterka transportado. La peze ŝargitan korboparon li povis levi, sed mi ne. La problemo nesolvita. Ni cerbumis pri rimedo, kaj li trovis solvon por tio. Li elŝutis duonon de la korboŝarĝo. Kiam ni metis la korboparon sur la ĉevalon, li repleniĝis ĝin per la ŝpato. Tiel mi elsendis la unuan ĉevalŝarĝon de sterko. Tiel mi lernis alian rimedon. Por la dua ŝarĝo mi jam ne demetis la korboparon. Mi plenigis ĝin dum la ĉevalo estis fikse alligita. La distanco inter la stalo kaj la kampo estis malpli ol cent paŝoj, sed dum la tuta antaŭtagmezo mi elsendis nur tri ĉevalŝarĝojn, ĉar la surŝarĝado estis forte temporaba.

"Frato, se mi rakontus ĉion tiel detale, eĉ tri tagoj kaj tri noktoj ne sufiĉus, do mi parolu pli mallonge.



Lukto por terlupaga redukto

Lignogravuraĵo de Ku Juan

"La tero estis sterkita. Pluvigis cetero. Sed mi ne scipovis plugi aŭ semadi. Mi interŝanĝis unu ĉevalan labortagon kontraŭ du homaj labortagoj kaj fine la tero estis prisemita.

"La brutoj en la vilaĝo estis forpelitaj de la malamikoj. En la tuta vilaĝo restis nur tri brutoj inkluzive de la mia. Venis la Okavoja Armeo. Oni organizis interhelpajn grupojn. Kiuj ne posedis ĉevalon, mem tiris la plugilon. Iuj persvadis min pri aliĝo al la grupoj. Mi respondis, ke mi ne scipovas labori. 'Se vi ne povas multe labori, do laboru iomete, sufiĉas, ke via ĉevalo estu enorganizita', diris ili. Tiam mi komprenis malmulte kaj timis, ke mia ĉevalo laboros senpage por la aliaj, mi demandis, ĉu estas permesite ne aliĝi al la grupoj. Oni respondis, ke la aliĝo devas esti libervola kaj ne deviga. Mi diris: 'Tiukaze mi ne volas.' Post kelkaj tagoj, ni homoj havis nenion por manĝi kaj la ĉevalo malgrasiĝis kiel skeleto pro manko de furago. Fine mi vendis la ĉevalon por nutri la homojn.

"La juna milio kreskis ne malbone. Malfeliĉe mi ne sciis kiel sarki. Mi sarkis ĉiutage kun la edzino, tamen la sarkita areo ŝajnis resti ĉiam same granda kiel en la unua tago. Kiam oni sarkis eĉ la norda flanko peceton tiom grandan kiom tiu ĉi korto, la herbaĵoj eĉ la suda flanko jam kreskis tiel alte, ke la milio estis tute kaŝita. La najbaroj ankaŭ kulturis milion. En tiu jaro la rikolto estis bonega. Ĉirkaŭe la rizo en la najbaraj kampoj kreskis je la alteco de homstature. Inter ili mia tri-mua tero similis al oblonga kavajo. La aŭtuna rikolto de la sarkita peco eĉ la norda ekstremo, kvankam ne komparebla kun la najbaraj kampoj, estis tamen tolerebla. La

spikoj—ne tre malgrandaj. Malfeliĉe la areo estis tro limita. Dum la stato de la suda flanko montrigis simple absurda. La tuta kampo estis kovrita de abrotano kaj aliaj diverskreskaj herbaĵoj. Inter ili oni ja povis trovi iom da milio. Sed la grandaj spikoj similis nur porkvostojn; la malgrandaj—simple cigaredstumpojn. La altaj kroĉigis sur la abrotanaj tigoj; la malpli altaj implikiĝis kun la rampaj kreskaĵoj sur la tero. La vivantaj havis la aspekton de ĉevala kolhararo; la mortaj—tium de fiŝostoj. La tuta rikolto de la tri muoj liveris kvin toŭ-ojn (1 toŭ-o = 1 dekalitro). Frato, se mi forvendus la ĉevalsterkon, mi enspezus eĉ pli multe. Mi, mia edzino kaj la ĉevalo, ĉiuj tri perlaboris nur tiom la tutan jaron! En tiu jaro, granda abundeco por ĉiuj, sed por mi estis malabundeco. Manga provizo mankis eĉ dum la rikolto.

"La vilaĝanoj rikoltis iom da greno kaj ekvolis, ke la infanoj lernu kelkajn vortojn. Ili sendis la kadron por proponi al mi labor-interŝanĝon. Ili kulturos por mi la teron kaj mi instruu iliajn infanojn. Kompreneble mi konsentis kun plezuro. Malfeliĉe mi jam tuj havis nenion por manĝi. La vilaĝanoj estis tre malavaraj. Ili konsentis zorgi pri mia manĝaĵo kaj pruntedonis iom da greno por mia edzino. Tiamaniere mia tuta malfacilaĵo estis forigita, kompreneble mi tre ĝojis kaj tuj malfermiĝis la lernejo.

"Ĉio ĉi okazis en la vintro de antaŭlasta jaro. Dum la pasinta jaro oni kulturis por mi la teron interhelpe. El la samaj tri muoj, prisemitaj per samspeca greno, mi rikoltis, ok kaj duonan tajnon da rizo. Frato, jen kiel mirinde oni laboris! Kvankam mi longe pasigis mian kvardekan jaron, mi nepre devas lerni. Ĉi-jare la komunumo asignis al nia lernejo du muojn da publika tero por ke la lernantoj ekzercu sin kelkan horon ĉiutage en terlaboro. Mi ankaŭ aliĝis al iu grupeto de la lernantoj por kune lerni kun la infanoj. Mi kredas: tio estas la sola rimedo, kiu garantias, ke oni neniam malsatas, vagante tra la tuta mondo.

"Frato, antaŭe mi opiniis same kiel vi, ke estas la tero, kiu kapabligas nin vivi komforte kaj sinjore, sed nun mi konscias, ke mi ŝuldis ĉion al Laŭ Ĉang, Laŭ Vang kaj Laŭ Sun. Ho, mi devis ne rigardi Laŭ Ĉang morti je malsato ne edutante al li helpan manon. Nun mi klare vidas, ke mia centmua bieno eĉ Ĉangkiajau estas ekster konsidero. Vastas la tero, sed malmultas la loĝantoj. Kvankam troviĝas ankaŭ senteraj enmigraĵoj, tamen eĉ la fekundaj kampoj apud la ŝoseo restas nekulturita kaj kovrigas de abrotano, kiu ja atentus pri la montkampoj? Du jarojn poste disfalos la kamprandoj kaj ĝi referariĝos dezerta monto.

"Frato, ne parolu plu, ke tero liveras manĝprovizon. La tero valoras nenion. La tero de mia tri-mua legomgardeno ne estas malpli bona ol la via, sed, ĉar mi ne scipovis labori, la rikolto ne valoris tiom, kiom la sterko. La cent muoj da ruĝa tero miksa de sablo ankaŭ estas neniel malpli bona, sed ĝi kreskigas nur abrotanon. Se vi volus uzi ĝin kiel brulaĵon, vi devas faldi propramane. Se vi dungus falĉiston, la elspezo ne estus malpli ol kiom vi pagus por acetu.

"Frato, tute prave diris la prezidanto de la kamarana asocio kaj la kamarado distrikta kadro, ke greno ververe estas la frukto de laboro. Se vi ne kredas, mem kulturu du muojn ĉi-jare kiel provon!"

Tradukis S. J. Zee

* Ĉi tiu historieto okazis dum la Kontraŭjapana milito, kiam la agra reformo ankoraŭ ne komenciĝis.

† Dum la Kontraŭjapana milito la Ruĝa Armeo estas alinomata kiel Okavoja Armeo kaj Nova Kvara Armeo.

‡ La blanka estas funebra koloro laŭ ĉina moro.





KDE marto post kiam la Higiena Ministerio de la Centra Popola Registaro publikigis la indikojn pri disvastigo de histoterapio, diversaj hospitaloj kaj kuracejoj tra tuta Ĉinio komencis studi kaj aplikadi la miraklofaran kuracrimedon. Laŭ nekompleta statistiko en 240 kuracejoj tra la tuta lando oni jam aplikis ĝin por kuraci pli ol 28,000 pacientojn. kaj 60-70 procentoj de la kuracoj bone sukcesis. En Nordorienta. Orienta kaj Sudokcidenta Ĉinio specialaj kunsidoj estas kunvokitaj por resumi la spertojn en la praktiko kaj fiksi diversajn regulojn por la kuracistoj aplikantaj histoterapion. Granda nombro da studentoj kaj doktoroj en diversaj medicinaj fakultatoj kaj hospitaloj estas studentantaj tiun kuracarton por savi suferantojn de diversaj malsanoj.

LAŭ la resumo farita de Cien Zun-ŭeĵ (錢俊瑞), ĝenerala sekretario de la Ĉina-Sovetia Amikeca Asocio (Ĉ.S.A.A.), pri la laboro de Ĉ.S.A.A., la membraro de la Asocio rapide kreskas. En oktobro de la pasinta jaro ĝi havis 3,040, 000 membrojn, sed nun jam 17,000,000. Ĝi eldonis 74 diversajn periodaĵojn kaj pli ol 500 librojn kaj pamfletojn. Cent kvardek filmotrupoj estis de ĝi organizitaj, kaj per 444 malpezaj projekciaj maŝinoj ili prezentadis Sovetiajn filmojn al la ĉina popolo. 48 el tiuj filmotrupoj raportis, ke ili faris pli ol 7,400 prezentojn al pli ol 16 milionoj da popoloj inkluzive de miloj da kamparanoj kiuj laboris por subjugi Huaj-Riveron.

EN liberigita Ĉinio la virinoj iom post iom eniras en

diversajn profesiojn. La duan de oktobro Li Jun-hua (李蘊華) kaj kvin aliaj knabinoj, kiuj ellernis la arton de direktado de tramo en kvar monatoj, komencis direktadi tramon en Pekino post solena inaŭguro ĉeestita de pli ol 1,300 personoj. Dum la inaŭgura soleno k-do Ĉang Hung-ŝun (張鴻舜), vicprezidanto de la Pekina Laborista Unuiĝo, diris: "En nova Ĉinio, la vojo de virina liberigo estas vastega. Estas senlima ebleco por la virinoj ellerni diversajn teknikojn. Tie ĉi la virinoj povas ĉion fari, nur se ili strebas."

LA Centra Popola Registaro havas specialan zorgon por disvolvi la edukadon de la naciaj minoritatoj. En la jaro 1951 15,120 milionoj da junaĵoj estas elspesitaj por ebligi bonan disvolvon de la klerigado de la naciaj minoritatoj krom la grandaj sumoj elspesitaj por la regulaj lernejoj por minoritataj nacioj. Laŭ nekompleta statistiko nun sintrovas 9,228 lernejoj (ne enkalkulante la lernejojn kaj kursojn por kadroj) ekskluzive por la minoritataj nacioj. Ili prizorgas la edukadon de pli ol 774,600 gelnantoj. Krom tiuj specialaj lernejoj ankoraŭ troviĝas 5,449 aliaj lernejoj en kiuj ankaŭ estas kursoj por minoritataj nacioj kaj entute 218,300 gelnantoj de naciaj minoritatoj.

NOVA societo por studi pri maro, lago kaj lageto

Koran Dankon al la Salutintoj

Okaze de la 2-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko ni ricevis 137 salutleterojn el 23 diversaj landoj al la Centra Popola Registaro de Ĉinio. Kun kora danko ni sendos belan poŝtkarton kun Esperanta teksto al ĉiu individua salutinto kaj ekz. de Popola Bildgazeto al ĉiu kolektiva salutinto.

**Ĉina Esperanto-Ligo,
Poŝtkesto 77, Peking, Ĉinio.**

estas fondita por helpi la naci-defendon, ekonomian disvolvon kaj aliajn kulturajn kaj sanitarajn laborojn de la lando per siaj esploroj. Ĝi planas starigi filiojn en naŭ ĉefaj urboj por fari esplorojn pri maroj kaj lagoj, studi la riĉon-

atingis brilajn sukcesojn en tre mallonga tempo, ĉar ĝi servas al la popolo!" diris Semenov, vicministro de la Sovetia Ministerio de Kinematografio je la malfermiĝo de la Filmsemajno. La Filmsemajno kiel diris Ĉang Ven-tien (張聞天), la ĉina ambasadoro ĉe Moskvo ne nur ebligis al la Sovetia popolo pli bone kompreni la heroon bataladon kaj konstruadon de la ĉina popolo, vidi la realan vivon de nova Ĉinio, sed ankaŭ plifortigis la solitaredon inter la du popoloj. Dum la Filmsemajno prezentigis en diversaj urboj de Sovetio la filmoj "La Liberigita Ĉinio (解放了的中國)," "La Venko de la Ĉina Popolo (中國人民的勝利)," kaj "La Bela Lando (錦繡河山)," kiujn kune produktis Ĉinio kaj Sovetio, kaj aliaj ĉinaj filmoj kiel "La Blankhara Knabino (白毛女)," "La Filino de Ĉinio (中華女兒)," "La Ŝtalaj Batalantoj (鋼鐵戰士)" k.a.

EN Port-Arthur (順旅) kaj Dajren (大連) sep el ĉiuj dek analfabetoj jam ellernis legi kaj skribi en la pasintaj du jaroj. Pli ol 51,000 el la gradigitaj kursanoj nun daŭre lernas en diversaj liber-tempaj lernejoj; kaj pli ol 16,000 laboristoj nun studas en specialaj teknikaj lernejoj. Por neniigi analfabetojn, aliaj 180 lernejoj, 1,700 kursoj kaj 200 bibliotekoj fondiĝos antaŭ la fino de tiu ĉi jaro.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

- 1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp;
- 2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp;
- 3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigi al ni nian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

LA unua oficiala kultura delegacio por viziti Hindion registaroj forlasis Pekinon je la 20a kaj Birmon invite de la du de septembro. Inter la 15 delegitoj estas fizikisto Ting Sie-lin (丁燮林), kiu gvidis la delegacion; literatura kritikisto kaj novelisto Ĉeng Ĉen-to (鄭振鐸); novelisto Liu Pe-ju (劉白羽); profesoro Feng Ju-lan (馮友蘭) k.a. La delegacio kunportis grandan kolekton de fotoj montrantaj la vivon kaj konstruadon en Ĉinio, ekzemplerojn de artaj verkoj kaj manfaritaj objektoj kaj sep kin-filmojn.

DIVERSAJ postrestaĵoj de la antikva epoko neolito, ŝtonaj hakiloj, pikiloj, tranĉiloj k.s. estas trovitaj en Venĉang-Gubernio (文昌縣) de Hajnan-Insulo de ĉinaj arkeologoj sub la gvido de Ĉen Kia-vu (岑家梧), vicestro de la Dua Grupo de la Centra Delegacio al diversaj regionoj. La trovitaj ŝtonaj objektoj similas al tiuj trovitaj ĉe la marbordaj regionoj de Kuangtung-Provinco (廣東省). Tio ĉi montras al ni, ke sur Hajnan-Insulo jam vivis homoj antaŭ la komenco de skribita historio kaj ke ili jam rilatigis kun la logantoj sur la kontinento.

LA 12an de la kuranta monato eldoniĝis la unua volumo de Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung kaj ĝi renkontis varmegan bonvenigon de la tutlanda popolo. La unuaj porcioj ricevitaj de librejoj en Pekino Ŝanhajo, Tienzin (天津), Mukdeno (瀋陽), Vuĉang (武昌), Hankou (漢口), Sian (西安) k.a. grandaj urboj de Ĉinio elĉerpigis post kelk-hora vendado. La Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung estas kolekto de fruktoj, kiujn Prezidanto Maŭ produktis aplikante la doktrinojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin en solvado de ĉinaj revoluciaj problemoj. Ĉiuj artikoloj de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung estas reviziitaj de la verkinto kaj klarigitaj per notoj de la Kompila Komitato. La unua volumo enhavas 16 artikolojn, el kiuj naŭ ĝis nun ne aperis en aliaj kolektoj de verkoj de Prezidanto Maŭ. Sekve de la eldono de tiu ĉi gravega verko, alta tajdo de lernado el la verkoj de Prezidanto Maŭ nun levigas tra tuta Ĉinio kaj milionoj da ekzempleroj de Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung estas bezonataj.

EKKONU ĈINAN POPOLON EL ĈINAJ LITERATURAJ VERKOJ!

Lu Sin: Sovaga Herbaro **US\$0.50**

Kun dukolora kovrilo.

Poezio en prozo el la majstra plumo de la plej giganta figuro de la ĉina moderna literaturo. La aŭtoro estis konata kiel la Gorkij de Ĉinio.

Liu Beju: Fajrolumo en la Fronto **US\$1.00**

Kun 5-kolora kovrilo.

Rakonto pri la brava sturmado de Ĉina Liberiga Armeo trans Jangze-Riveron, 1949, verve donanta la vivan kaj kortuŝan etoson regantan inter la bravaj kaj heroaj batalantoj. Figure klarigas la libro, kial kaj kiel venkis la ĉina popolo.

La traduka laboro de la ambaŭ ĵus eldonitaj verkoj estas fervore kaj zorge plenumita de S. J. Sü.

Lu Sin: Elektitaj Noveloj **US\$0.80**

Kun portreto de la aŭtoro sur la kovrilo.

Ĉiu peco estas perlo, entute dekunu perloj el la noveloj de la majstro.

La prezoj inkluzivas la afrankon. Ĉiuj haveblaj ĉe Ŝanhaja Esperantista Ligo, (P.O. Kesto 636, Shanghai, Ĉinio.) kiu pretas interŝangi tiujn librojn kun allandaj eldonistoj esperantaj kontraŭ iliaj eldonaĵoj. Interesatoj sendu liston de ŝanĝotaj libroj.